

Bulgara Esperantisto

Decembro 1989



ENHAVO

- 2 Vigla kaj emociplena festo (Atanas Ilkov)
- 6 III Balkanlanda E-Konferenco en Ohrid (Maria Jan-
kova, Georgi Miĥalkov, mag. Gvozden Srediĉ)
- 13 Nia instruisto Kunĉo Vălev 70-jara (Georgi Miĥalkov)
- 15 Katalogo de E-eldonaĵoj
- 19 80-jara jubileulo (Mariana Elenova)
- 21 Originala verkaro (Anneke Buys, Cvetanka Uzunova,
Nikola Pilev)
- 23 Oazis'89 (Veneta Baleva)
- 24 Pri lingva instituto (Nikola Nikolov, Violin Oljanov)
- 26 Vanga (Krasimira Stojanova)
- 28 Vivĝojaj vintraj popolkutimoj (Evgeni Georgiev)
- 29 En la centra gazetaro (Slavĉo Davidov)
- 30 Memore al Dimităr Zlatarski—Miti (Doc. Georgi Di-
mov)
- 31 Nia enketo
- 32 Deziras korespondi
- III Distroj

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Krâstju KARUCIN,
Kunĉo VĂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: „Hristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario,
tel. 22-80-86.

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akcep-
tas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj,
verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu
bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per
la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna
poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32
nederlandaj guldenoj-aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por
socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj —
7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. gld.

„Bulgara Esperantisto“ havas abonantojn en 47 landoj.

**Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“
por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.**

Sur la unua kovrilpaĝo: Spuro sur la neĝo.

Foto: Ivan SALABAŜEV

BRITIO

S-ro **Paul Hewitt**, 26 Highfield
Road, North Thoresby, Great
Grimsby, SOUTH HUMBERSIDE
DN36 5RT

FRANCIO

S-ro **Joseph Barré**, 10, Rue du
Sénat, F—44300 NANTES

**Union Francaise pour L'Espe-
ranto**, 4 Bis, Rue de la Cerisaie,
75004, PARIS

IRLANDO

Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, DUBLIN 6W

JAPANIO

S-ro **Yoshiaki Mizuno**, Hanazono
1—2418—18, TOKOROZAWA,
359

*Niaj
perantoj*

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. „Dame
Gruev“ 65, 96000 OHRID

MEKSIKIO

S-ino **Leonora Torrez T.**, Playa
Hornos 575, COL. MARTE, 08830,
MÉXICO D. F.

S-ro **Enrique Lemus**, Insurgentes
Sur 3493, Villa Olímpica, Edif. 27—
001, 14020 MÉXICO D. F.

PORTUGALIO

Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. João Couto, 6, r/c A, P—
1500 LISBOA

SVEDIO

Sveda Esperanto-Federacio
c/o Lisbet Andreasson, Södra Rö-
rum pl 455, S—242 94 HÖRBY

SVISLANDO

Esperanto-Perantejo, Wein-
gartstr. 21, CH—3014 BERN

SUD-AFRIKO

S-ro **C. S. Beckford**, P. O. Box
1227, CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto League, For North
America, Inc., P. O. Box 1129, EL
CERRITO, CA 95430

Jaro 58

N-ro 12

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

Kunvoko de la 42-a Kongreso de BEA

En sia kunsido la 24-an de oktobro 1989 laŭ art. 10 de la Statuto de BEA, la Buroo de CE de BEA prenis oficialan decidon kunvoki la laŭvican 42-an Kongreson de BEA la 30-an de junio kaj 1-an de julio 1990 en urbo Ŝumen.

La raport-elekta kampanjo de la kluboj, sekcioj kaj societoj okazos ĉe la jena plano:

- raport-elektaj kolektiĝoj de la kluboj — de la 1.01. ĝis la 20.01.1990;

- raport-elektaj kunvenoj de la societoj — de la 20.01. ĝis la 20.03.1990;


- raport-elektaj konferencoj de la sekcioj — de la 20.03. ĝis la 10.04.1990.

La elekto de delegitoj por la Kongreso efektiviĝos tiel, ke je 15 personoj oni elektos po 1 delegiton. Se ekster la nombro de societaj membroj, rajtigantaj je certa nombro de delegitoj restas pliaj membroj sub 15 personoj, societo rajtas ricevi plian delegiton.

La Kongreso krom labora havos ankaŭ amaskulturan karakteron dum la menciitaj du tagoj. Por la gastoj kaj civitanaro ekster la kongresa laborprogramo okazos renkontiĝo. En ĝi eblos partopreni bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj.

La preparlaboroj de la Kongreso postulas kompletan mobilizon de la fortoj de la Asocio. Ties bona organizado estos sukcesa finiĝo de la unua etapo de la renovigo en BEA, komencita en la pasinta jaro.

VIGLA KAJ EMOCIPLENA FESTO



Finiĝas emociplena jaro por nia revuo „Bulgara Esperantisto“. Ĝi eniras la okdek-jariĝon kun riĉa pasinteco kaj juneca vervo. En multaj artikoloj ni jam raportis pri la historio de nia revuo.

Kulmino de la jubilea jaro estis la Festo de „Bulgara Esperantisto“. Ĝi okazis de la 29-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro k. j. La tritaga riĉa programo altiris en la pitoreska Velingrad pli ol 200 esperantistojn el multaj loĝlokoj. Ĉeestis ankaŭ gastoj el Greklando kaj Jugoslavio. Venis E-jurnalistoj, aktivuloj, kulturagantoj, veteranoj-kunlaborantoj.

La Festo estiĝis evento ne nur pro la fakto, ke ĝi okazas por unua fojo. Pri ĝi sciigis la bulgaraj amaskomunikiloj. Bulgara Radio elsendis anticipe intervjuon kun la ĉefredaktoro Maria Jankova, la samon faris tag-ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“. Omaĝe al la jubileo ĵurnalo „Oteĉestven Glas“ — Plovdiv, publikigis artikolon. Velingrad kaj proksimaj loĝlokoj buntis je festaj afiŝoj. Niaj dommastroj, la esperantistoj el societo „Stoju Kalpazanov“ faris multon por la bona organizo de la Festo.

29.09.89. En la agrabla aŭtuna tago alvenis en Velingrad multaj fidelaj amikoj de „Bulgara Esperantisto“. Vespere komenciĝis la oficiala programo. Bulgara E-Teatro prezentis por unua fojo en Bulgario la unuaktan teatraĵon de Emilija Lapenna „Lanĉo“. Laŭteme ĝi estas ligita kun la epoko de Zamenhof. La aktoroj el BET klopodis kaj sukcesis pligrandigi la emocian etoson de la vespero. Ankoraŭ ne mallaŭtiĝis la aplaŭdoj de la spektantoj, kiam Belka Beleva nome de BET salutis la Redakcion okaze de la 70-a jubileo kaj enmanigis al la ĉefredaktoro salutleteron.

Post la teatraĵo sekvis bunta artprogramo — sin prezentis Koruso de instruistinoj-esperantistinoj el Pazarĝik, vokala virina kvarteto esperantista el Velingrad, E-poetoj Penka Papazova kaj Nikola Pilev recitis siajn lastajn verkojn.

30.09.89. Matene renkontis nin malbona vetero kaj pluvetis. Sed la urba blovorkestro obstine rompis la sabatan trankvilecon. Kelkajn monatojn antaŭe la sama junulara orkestro partoprenis en Parizo la festojn okaze de la 200-jariĝo ekde Franca Revolucio. En tiu pluvmateno en la urbo-centro ĝi ludis speciale por nia festo.

En la salono okupis lokojn en la honora prezidantaro: prezidanto de BEA Sava Dâlbokov, veteranaj E-ĵurnalistoj Nikola Aleksiev kaj Ĥristo Gorov, eksaj ĉefredaktoroj de „Bulgara Esperantisto“ — Violin Oljanov, Kunĉo Vâlev kaj Donĉo Ĥitrov, nuna ĉefredaktoro Maria Jankova, sekretario de KK de BKP en Velingrad Zavarin Marov, prezidanto de la loka E-societo inĝ. Boris Gaĝanov.

La plena salono atente aŭskultis mallongan, sed riĉenhavan raporton de Maria Jankova, rememorojn de Nikola Aleksiev kaj salutparolon de la prezidanto de BEA Sava Dâlbokov. Reprezentanto de la loka urbeŝtraro, sekretario de KK de BKP Zavarin Marov enmanigis salutleteron kaj esprimis la deziron de la civitanoj ĉiam gastigi esperantistojn. Dum la solena kunveno Maria Jankova anoncis, ke la Redakcio estas salutita telegrame kaj letere de la partoprenantoj de la III Balkanlanda Esperanto-Konferenco en Ohrid (Jugoslavio), de la revuoj „Starto“ (Ĉeĥio), „Jugoslavia Stelo“, „Pola Esperantisto“ (Pollando), „der esperantist“ (GDR); de Asocio „Monda Turismo“, de kunlaborantoj kaj legantoj el Britio, Sovet-Unio, Jugoslavio, Hispanio, Belgio, Svislando, Francio, Usono, Japanio, Portugalio, Meksikio, Sud-Afriko, Greklando kaj Rumanio. Sincerajn vortojn, nome de Esperanta Verkista Asocio (EVA), eldiris Georgi Miĥalkov.

La nunaj atingoj de „Bulgara Esperantisto“ kiel organo de BEA, kiel komunikilo kaj interesa legaĵo por multaj legantoj en Bulgario kaj tuta mondo, eblis nur rezulte de la abnegacia laboro de kelkaj generacioj de



Honora prezidantaro

ĵurnalistoj kaj kunlaborantoj. Per Honoraj Insignoj de BEA, omaĝe al la 70-jariĝo de la revuo kaj pro meritoj en la Esperanta ĵurnalismo oni honoris jenajn personojn: Nikola Aleksiev, Ĥristo Gorov, Kunĉo Vâlev, Violin Oljanov, Stefan Masârov, Ivan Kere-midĉiev, Canko Murgin, Krâstju Karucin kaj Donĉo Ĥitrov.

Al la plej aktivaj kunlaborantoj dum la jubilea jaro estis disdonitaj monpremioj: **unua** — al Ĥristo Manolov (Polski Trâm-beŝ), pro profunda traktado de la gravaj problemoj en nia movado; **dua** — al doc. Georgi Dimov (Varna), pro urĝa reago al E-eventoj kaj aranĝoj; **tria** — al Cvjatko Todorov (Ŝumen), pro konstanta multjara kunlaboro al la revuo.

Estis anoncitaj ankaŭ la rezultoj de la kvizo, publikigita en n-ro 2/1989 de „BE“ kaj dediĉita al la 70-jariĝo de la revuo.

Salutoj, rememoroj, premioj — signoj de vera festo...

01.10.1989. Laŭ plano oni antaŭvidis

ekskurson, sed la vetero malhelpis multajn partopreni ĝin. Finfine pli ol 60 personoj ekveturis aŭtobuse al aŭtune orkoloraj montetoj de Rodopi-montaro. Ĉiuj vizitis la ekzekutlokon de la brava antifaŝisto esperantisto Stoju Kalpazanov. Parto de la grupo vizitis ankaŭ la ekzekutlokon de heroino de Ĉepina valo — Vela Peeva. Interese kaj emocie pri la antifaŝista kaj esperantista agado de la herooj rakontis la veterano Manol Ĉolev el Velingrad.

Sufiĉe pri la oficiala programo. Ja ekde romia tempo ĉiu festo portas ankaŭ alian „ĉiutagan“ vizaĝon. La aranĝo en Velingrad ne pasis nur kiel ceremoniaro, ĝi estis bona okazo por kontaktoj inter la redakcianoj, kunlaborantoj kaj legantoj. La 30-an de septembro — post la oficiala kunveno, la Festo vestis sian laborkostumon. Okazis libera kaj sincera konversacio. Oni esprimis opiniojn, proponojn, starigis konkretajn dezirojn rilate la enhavon, eksteran aspekton kaj disvastigon de „BE“. La intereso al redakcia kuirejo estis tiel gran-



Koruso de la instruistinoj — Pazarĝik

da, ke la salono dum tri horoj estis plenkupita.

La Festo finiĝis, la jubilea jaro de la revuo forpasas. Sed „Bulgara Esperantisto“

daŭre eniros vian domon kiel bona kaj elokventa gasto.

Atanas ILKOV



Parto de la ĉeestantoj

Fotoj: Kiril KALĈEV

KVIZO: PREMIOJ KAJ RESPONDOJ

Okaze de la 70-jara jubileo de „Bulgara Esperantisto” en n-ro 2/1989 ni publikigis demandojn de kvizo. Ĝis la limdato en la Redakcion venis dekaj leter-respondoj — de bulgaraj esperantistoj kaj alilandaj legantoj. Al ĉiuj ni sincere dankas.

La libropremion — „Prologo 1905” (Eldonejo „Progreso” — USSR) ricevas: Dimo Martinov (v. Krân, Haskovo-departemento), Hristo Tonev (Ŝumen), Elena Popova (Tolbuĥin), Zoja Kaĉalova (u. Tiĥvin, USSR), Sonja Tiĥova (Gabrovo) kaj Otto Kaczinski (u. Havelberg, GDR).

Elkoraĵo gratulon!

Do, jen la ĝustaj respondoj:

1. La bulgaroj eksciis pri Esperanto de la rusa gazeto „Niva” (1887).
2. En 1921 dum la regado de la progresema Bulgara Agrarana Popola Unuiĝo (BZNS) Esperanto estis enkondukita en la lernejojn kiel fakultativa lernobjekto. Ĝi daŭris ĝis 1923, kiam la agrarana registraro estis renversita per puĉo.

En 1937 la Ministerio de la komerco, industrio kaj laboro permesis la fakultativan lernadon de Esperanto en la mezaj komercaj kaj profesiaj lernejoj.

3. La unuan numeron de „BE” redaktis la membroj de Centra Propaganda Komitato Simeon Petkov, Georgi Atanasov kaj Stefan Minkov.

4. La Ministerio de Popola Instruado per dekreto № 9607 de la 10-a de aprilo 1928 nuligis la lernantajn organizaĵojn kaj Gelernantan Esperantistan Asocion, fermis la kursojn de Esperanto por lernantoj kaj malpermesis ricevi kaj disvastigi la revuojn „Bulgara Esperantisto” kaj „Esperantista Junularo”.

5. En 1937 oni komencis E-disaŭdigojn de la radiostacioj Sofio, Varna kaj Stara Zagora.

6. Oficialaj organoj de BEA estis ankaŭ: „Lumo” (1907—1910), „Danubo” (1910—1912), „Internacia Kulturo” (1945—1950) kaj „Bulteno” (1954—1957).

Esperanto estas nia ŝanco



En 1983 en bulgara urbo Bankja (apud Sofio) oni organizis la unuan oficialan forumon de balkanlandaj esperantistoj kaj nomis ĝin renkontiĝo. Poste — en 1984, en Ateno okazis Dua Balkanlanda E-Kongreso kaj ĉi-jare en Ohrido — tria, nomita konferenco.

Fakte la nomo de la forumo tiom ne gravas. Ĝi dependas de la konkretaj kondiĉoj en la gastiganta lando. Pli gravas, ke dum tiuj aranĝoj renkontiĝis amikoj el najbaraj kaj proksimaj landoj, kiuj per Esperanto strebas solvi la lingvan problemon sur Balkanio — tiu vera Babelturo. Laŭ ili la Internacia Lingvo estas unika ŝanco kaj reala ebleco por pli profunda animproksimiĝo de la geografie proksimaj popoloj loĝantaj sur la duoninsulo.

Diference de la antaŭaj balkanlandaj forumoj, tiun en Ohrido partoprenis nur reprezentantoj de tri landoj: Bulgario, Greklando kaj Jugoslavio. Forestis niaj samideanoj el Albanio, Rumanio kaj Turkio. En Ohrido — tiu antikva kaj bela urbo, dum la tri konferencaj tagoj gastis pli ol 550 geesperantistoj allogitaj de la samideana etoso kaj riĉenhava E-programo, sed ankaŭ de la pitoreskeco de Ohrida lago kaj ĝia

ĉarma bordo. Mi nur mencias, ke la lago kaj urbo estas sub la protekto de Unesko. La lagakvo estas tre pura kaj en ĝi vivas unikaj fiŝspecioj.

La konferenca temo estis sufiĉe ampleksa kaj interesa: „Kontribuo de la Esperantomovado al evoluigo de kultura kunlaboro kaj turismo en Balkanio“. Per apartaj prelegoj kaj eldiroj ĝin pritraktis multaj esperantistoj kaj mi mencias nur la plej gravajn kontribuadojn al la laborprogramo.

Kunĉo Vălev — prezidanto de la Balkanlanda Kunordiga Komitato, faris enkondukan parolon pri la kultura kunlaborado. Laŭ li unue oni devas enkonduki la lingvon en internaciajn organizojn — sindikataj, porpacaj, virinaj, transportaj k. a. Li proponis reciprokajn amikajn gastadojn; senpagajn gastservojn; komunajn literaturajn iniciatojn (ekz. komunan periodaĵon); reciprokajn gastadon de artensembloj, de E-prele-



Prezidantaro

Foto: Petko ARNAUDOV



Bulgaraj partoprenantoj

gistroj, kursgvidantoj; balkanlandan folkloran festivalon.

Aldonan enkondukan parolon faris Maria Pontika — membro de la Balkanlanda Kunordiga Komitato. Ŝi alvokis por Balkanio sen vizitoj, proponis la kreadon de Balkana Esperantista Federacio kaj dividis sian sperton pri la ligoj kun diversaj ŝtataj instancoj.

Zlatoje Martinov kaj Gvozden Sredić — prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo, prelegis pri E-turismo.

La laborprogramo ankaŭ inkluzivis kunvenojn pri kunlaboro inter landaj E-asocioj kaj ties junularaj sekcioj, fakajn kunvenojn de instruistoj-kursgvidantoj, fervojistoj kaj literaturagantoj. Dum la renkonto de E-verkistoj, literaturaj tradukistoj kaj eldonistoj prelegis bulgara verkisto, esperantista Georgi Miĥalkov. La ĉeestantaj redaktoroj de E-revuoj el Bulgario kaj Jugoslavio rakontis pri sia laboro kaj estis aprobitaj konkretaj proponoj por estonta pli intima kunlaboro sur la E-literatura kaj ĵurnalisma kampo. La junuloj pritraktis la reciprokan partoprenon en internaciaj labortendaroj. Fervojistoj parolis pri fervojrapideco kaj la instruistoj kaj kursgvidantoj konstatis, ke ili ne sufiĉe kunlaboras.

La konferenco finiĝis per akcepto de rezolucio. La sekvonta — kvara, balkanlanda E-forumo okazos post du jaroj.

La konferenco estis vaste popularigita per Ohrida radiostacio. Atento al ĝi turnis ŝtataj instancoj. En ĝia laboro partoprenis prof. Pavle Bogetić — membro de la Prezidentaro de la Federacia Konferenco de So-

cialisma Unuiĝo de Laborpopolo. La urbestro de Ohrido akceptis partoprenantojn, dirinte interalie, ke „... la poresperanta agado en Ohrido komenciĝis en 1925. Hodiaŭ en nia urbo ekzistas E-organizo, kies agado sentiĝas en nia vivo... Dank' al viaj aktivecoj dum la restado ĉi tie vi grave kontribuos al plimultigo de la adeptoj de Esperanto, kies konfirmiĝo en la mondo estas ankaŭ ĉiam pli granda. Kun via humana misio jen ĉi tie antaŭeniĝas kultura kunlaboro inter ĉiuj homoj en Balkanio tiom bezonata en tiu ĉi tempo”.

Bonajn impresojn lasis en la memoro de la konferencanoj ne nur la vizito al la bele ga malnova urbo, monaĥejo „Sankta Naŭmo” kaj al aliaj romantikaj lokoj, sed ankaŭ la bona organizado kaj gastamo de la dommastroj.

Dum la konferenco bulgaroj sin prezentis per diversaj prelegoj kaj per aktiva partopreno en la arta programo. Nia grupo estis ĉekape kun la Prezidanto de BEA Sava Dălbokov, kiu salutis la konferencon.

Sur Ohrida scenejo Bulgara Esperanto-Teatro por unua fojo prezentis spektaklon „Lanĉo” laŭ la samtitola unuaktaĵo de Emilia Lapenna. La teatraĵo estas dediĉita al Adamo Goralski Pawlikovski — la meceno de la Esperanta teatra arto. Ĝi estis premiita en Belartaj Konkursoj de UEA-1988. Reĝisoro de la spektaklo estas Gertruda Lukanova, lingva gvidanto — Belka Beleva. La spektantoj akceptis la surscenigon de la teatraĵo per tondraj aplaŭdoj.

Mi kaptis la raran okazon esti en Ohrido certa tempo kun la aŭtorino de la teatraĵo — la fama E-kulturaganto Emilija Lapenna, por fari kun ŝi intervjuon speciale por la legantoj de „Bulgara Esperantisto”.

— Kiel kutime, ni komencu de via esperantistigo...

— Tio estis antaŭ multaj jaroj, antaŭ la Dua mondmilito. En 1931 mi komencis viziti Akademian Esperanto-Klubon en Zagrebo, kiu tiam havis gravan rolon en la E-movado Zagreba kaj Jugoslavia. La klubon gvidis la estrarano de tiama Jugoslavia Esperanto-Ligo prof. d-ro Ivo Lapenna. Tiam ne estis federaciaj E-ligoj kaj ni havis kontaktojn kun la esperantistoj el tuta Jugoslavio. Antaŭ la milito estis naciaj kongresoj esperantistaj. En tiu tempo Ivo Lapenna kaj mi geedziĝis.

Sed... venis la milito. Kiam la germanaj faŝistoj eniris Jugoslavion, multaj E-klubo estis disbatitaj. En Zagrebo funkciis ankaŭ laborista E-societo kaj Esperanto-klubo. Nia — Akademia Esperanto-Klubo, estis orientita al socialismo, multaj simpatiis al komunismo. Pro tio post veno de la faŝistoj pluraj niaj samideanoj estis mortpafitaj. Ekzemple Bude Barjan, kies nomo nun portas Zagreba E-Klubo, aŭ Josip Granga — talenta tradukisto. Aliaj samideanoj devis kaŝi sin kaj estiĝis partizanoj.

Nun en Zagrebo estas kelkaj neregistritaj E-grupoj kaj ses Esperanto-organizaĵoj: tri societoj, du ligoj — kroacia kaj zagreba, kaj internacia



kultura servo, kiu estas profesia organizaĵo pri kulturaj aranĝoj, ĉefe Esperantaj. Ĝi ankaŭ organizas PIF (Pup-teatra Internacia Festivalo), en kiu ĉiujare partoprenas bulgaraj pupteatroj.

Post la milito mi ekaktivis en „Bude Barjan” kaj estiĝis estrarano de Kroacia kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo. De 1953 ĝis 1987 mi estis ĉefdelegito de UEA por Jugoslavio kaj ankaŭ komitatano de UEA.

Antaŭ la milito mi kunlaboris al tre bona jugoslavia E-gazeto „La Suda Stelo”. Ĝi havis ĉiam ampleksan literaturan parton. Fakte la vivo de tiu eldonaĵo ĉesis en 1973. Komencis aperi pluraj E-gazetoj, eldonitaj de la ses Esperanto-ligoj en Jugoslavio, sed bedaŭrinde neniu estis tiel reprezenta. Mi estis ano de la Redakta Komitato de „La Suda Stelo”, kie mi okupiĝis pri literaturaj recenzoj, tradukarto, originalaj verkoj.

Ĉar vi interesiĝas pri miaj verkoj, mi nur mencios ilin: „Teatro en societo” (1953), „Nova teatro” (1966), „Esperanto por ĉiuj” (lernolibro por komencantoj, 1980). „Lanĉo” estas tria mia pre-

zentita teatraĵo, malgraŭ ke en mia tirkesto mi havas plurajn dramojn kaj radioteatraĵojn. Bedaŭrinde ne estas radio-reĝisoroj esperantistaj. Ne sufiĉas ankaŭ la radiotempo. Nun mi estas konstanta recenzanto de „Heroldo de Esperanto”.

Multajn jarojn mi estis sekretario de Belartaj Konkursoj de UEA.

— Kia estas laŭ vi la diferenco inter la nuna kaj pasinta E-movadoj?

— Tiam estis plia entuziasmo. Pli bone estis organizita la societa vivo. Nun la homoj ne tiel interesiĝas pri Esperanto (estas aliaj pli allogaj manieroj por amuziĝi) kaj malfacile povas organizi ion. Mankas al nia movado sociologia kaj psikologia analizoj, eĉ ne estas statistiko. Ni povus trovi la solvon nur post profundaj esploroj.

— Kiaj laŭ vi estas la plej akraj problemoj, starantaj antaŭ la internacia E-movado?

— Mi nomas ilin hontoj por nia movado. Tio estas: tro malmultaj radio-elsendoj en Esperanto; neekzisto de internacia komitato, kiu kontrolu kaj rekomendu lernolibrojn. Ne estas komuna programo por diversaj seminarioj kaj kursoj je nacia kaj internacia niveloj.

— Per kio valoras la nuntempa E-literaturo?

— E-literaturo estas unu el la plej evoluintaj kampoj en Esperanto. Centaj interesaj libroj, sed mankas legantoj. Ankaŭ sukcesa estas la eldonado de periodaĵoj. Sed ne sufiĉas bonaj movadaj organizantoj kaj administrantoj — multe da labo-

ro, neniŭ scias pri ĝi, nur riproĉoj.

— Ĉu vi konas la bulgaran Esperanto-movadon?

— Mi vizitis vian landon la unuan fojon en 1947 — por 30-a nacia kongreso en Plovdiv kaj poste ĉeestis la 48-an UK en 1963 en Sofio. Bulgario tre plaĉas al mi kaj mi tre, tre estimas la E-kulturan agadon de bulgaraj esperantistoj. En ĉiuj artaj

programoj de UK ĉiam estas bulgaraj nomoj. Inter niaj landoj estas ĉiam intimaj amikaj esperantistaj rilatoj, kiujn pruvis ankaŭ ĉi tiu konferenco.

— Kiel vi pritaksas la spektaklon „Lanĉo“ prezentitan de BET?

— Mi estas tre feliĉa, ke BET surscenigis tiun verkon. La aktoroj prezentis la teatraĵon tre bone, sukcesis krei la etoson de tiu tempo

kaj familio. La verko estas literatura prezento de unu horo el la unua tempo de Esperanto, el la vivo de tute juna paro Zamenhof. Fakte BET prezentas la duan mian teatraĵon: en 1968 ili enscenigis unuaktaĵon „Interparolo kun la busto de Zamenhof“. Mi estas tre danka precipe al Belka Beleva kaj Kunĉo Vâlev.

Intervjuis: Maria JANKOVA

La literaturo — rimedo por balkana kunlaborado



Dum jarcentoj la Balkana Duoninsulo estis unu el la plej danĝeraj lokoj de la mondo. Multaj konfliktoj komenciĝis ĉi tie, lokaj militoj kontraŭstarigis homojn, kiuj devas vivi najbare, en amikeco kaj interkompreno. Ne hazarde en la monda historio la Balkana Duoninsulo estis nomita pulvokelo, kiu minacis la pacon de la tuta mondo.

La balkanaj landoj devas jam trovi novajn eblecojn al kunlaboro kaj unu el tiuj vojoj, kiuj gvidas al amikeco kaj paca ek-

zisto sur la Balkanoj, estas sendube la kulturo, la komuna ekkono de la riĉaj balkanlandaj kulturaj valoroj. Unu el la plej bonaj



Ĉe la bordo de la pitoreska lago

rimedoj proksimiĝi unu al alia, penetri en la pensmanieron de la aliaj, en iliajn morojn, tradiciojn, naciajn trajtojn kaj specifan karakteron, estas la literaturo.

Dum jarcentoj la balkanaj landoj kreis riĉajn, valorajn literaturojn. En tiuj landoj vivis eminentaj verkistoj, kies verkoj eniris la trezorejon de la monda literaturo. Sufiĉas, se ni menciis nur la nomojn de Ivo Andriĉ, Miroslav Krleža, Branislav Nušić, Desanka Maksimović, Mihaj Eminescu, Mihail Sadovjanu, Nikos Kazantzakis, Konstantinos Kavafis, Odiseas Elitis, Janis Ricos, Ismail Kadare, Nazam Hikmet, Ĥristo Botev, Ivan Vazov, Pejo Javorov, Elisaveta Bagriana...

En la centro de iliaj poemoj, noveloj, romanoj, dramoj estas ĉiam la homo kun liaj eternaj problemoj, kun lia laboremo, kun lia sopiro al pli bona kaj pli feliĉa vivo, kun lia deziro vivi en paco kaj amikeco. Ĉu ni povas forgesi la rimarkindan romanon de Ivo Andriĉ „La ponto super Drino“, la poemon de Kavafis „Itaka“, la romanon de la albana verkisto Ismail Kadare „La generalo de la morta armeo“ aŭ la romanon de Ivan Vazov „Sub la jugo“. Tiuj ĉi verkoj, kreitaj sur la Balkana Duoninsulo, respegulas la plej karakterajn trajtojn de la homoj, loĝantaj en tiu ĉi mondangulo — ilian deziron esti liberaj kaj estimi la aliajn homojn. Tiuj ĉi verkoj enhavas la grandan sopiron de la balkanaj loĝantoj ekkoni la mondon kaj disvastigi sian spiritan kaj kulturan horizonton.

La esperantistoj el la diversaj balkanaj landoj ĝis nun faris nenion por la utiligo de la Lingvo Internacia en siaj kulturaj kontaktoj. Plurfoje ilia agado estis tre aktiva kaj tre fruktodona. Sufiĉas menciigi la balkanlandajn Esperanto-renkontiĝojn dum diversaj periodoj, la provojn eldoni komunajn Esperanto-revuojn kiel ekzemple la Esperanto-revuon „Danubo“ — organo de la bulgaraj kaj rumanaj esperantistoj, kies fondiĝo okazis jam en la somero de 1910 dum la Kvara Kongreso de Bulgara Esperantista Ligo en Sofio. La Kongreso decidis, ke „Danubo“ aperos en Bukureŝto sub la gvidado de la fama rumana esperantisto d-ro Robin. „Danubo“ estis bonega provo por efektiviigi la kunlaboron de la balkanlandaj esperantistoj kaj malgraŭ ke ĝi ne havis multajn abonantojn kaj ekzistis dum mallonga tempo, ĝi sukcesis plenumi sian historian rolon kiel unua paŝo por unuigo

de la esperantistoj sur la Balkana Duoninsulo.

Enkadre de la 29-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, de la 24-a ĝis la 26-a de septembro 1946 en Asenovgrad, okazis Balkanlanda Esperantista Konferenco. La partoprenantoj en la Konferenco decidis eldoni kulturan revuon de la balkanlandaj esperantistoj sub la titolo „Internacia Kulturo“. Ĝia ĉefredaktoro fariĝis la konata bulgara Esperanta poeto Asen Grigorov. Sur la paĝoj de „Internacia Kulturo“ aperis en Esperanto pluraj poemoj, rakontoj de diversaj balkanlandaj aŭtoroj.

„Danubo“ kaj „Internacia Kulturo“ montris, ke la esperantistoj el la balkanaj landoj ĉiam strebis per Esperanto kaj la Esperanta literaturo, traduka kaj originala, servi al la amikeco kaj kunlaboro de la balkanaj popoloj.

Dum la lastaj jaroj tre vigliĝis la Esperanta libroeldonado. La plej aktivaj tiukampe estas Jugoslavio kaj Bulgario. En Jugoslavio aperis esperantlingve pluraj verkoj de famaj poetoj kaj verkistoj. Sur la paĝoj de „Jugoslavia Stelo“, organo de Jugoslavia Esperanto-Ligo regule aperas esperantlingvaj tradukoj de serbaj, kroataj, slovenaj kaj aliaj aŭtoroj.

Dum la lasta jaro revuo „Bulgara Esperantisto“, organo de Bulgara Esperantista Asocio, publikigis plurajn bonegajn Esperanto-tradukojn de poemoj de elstaraj nuntempaj bulgaraj poetoj.

La paca kunekzisto sur la Balkana Duoninsulo dum la lastaj kelkaj jardekoj forte impulsis la originalan Esperantan literaturon en niaj landoj. Post la konataj, famaj Esperantaj aŭtoroj Ivo Rotkviĉ, Tibor Sekelj, Emilia Lapenna, Asen Grigorov, Ĥristo Gorov, Dimităr Zlatarski, venis nova talenta generacio de Esperantaj poetoj kaj verkistoj.

Nun la Esperantaj tradukistoj kaj literaturistoj el la najbaraj balkanaj landoj entreprenis novan gravan komunan literaturan laboron, la eldonon de „Balkana Antologio“, kies ambicia celo estas enhavi verkojn de balkanlandaj aŭtoroj, kiuj kreis kaj kreas je la fino de la XIX kaj en la XX jarcentoj. Ni esperu, ke „Balkana Antologio“ baldaŭ pretos kaj ĝi estos nova frukto de nia literatura kunlaboro.

Georgi MIĤALKOV

Ekologia aspekto de moderna turismo



Turismo estas socia kaj ekonomia homa aktiveco ĝenerale, ege pozitive taksata en la tuta mondo. Unuflanke, ĝi ebligas al turistoj konatiĝi kun proksimaj kaj foraj landoj, iliaj vidindaĵoj, kulturoj kaj homoj. La evoluigintaj trafikaj rimedoj (aŭtomobiloj, aviadiloj, fervojoj, ŝipoj) ebligas nuntempe al la homoj rapide kaj komforte viziti praktike la tutan mondon.

Kompreneble, kiel kutime, ekzistas ankaŭ alia (same pozitiva) flanko: la ekonomia. La vizitantoj kutime devenas de la riĉaj evoluintaj industriaj landoj kaj pretas bone pagi por kontentigo de sia scivolemo aŭ ripozemo. El tio bone perlaboras turismaj, transportaj, hotelaj, restoraciaj kaj multaj aliaj kompanioj. Tre interesataj pri tiu evoluo estas kompreneble ankaŭ vizitataj landoj: turismo estas por ili iaspeca eksporto de suno, vidindaĵoj, maro, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, memoraĵoj, tre diversaj servoj ktp. Kaj tiu aktiveco alportas devizojn — ĝenerale mankanta afero en tiuj landoj.

Sed... Ekzistas ankaŭ alia flanko de la

afero, tiu ekologia, kiu minacas ne nur turismon sed la tutan nuntempan homan civilizon, kiu jam ricevis kromnomon „civilizo de forfalaĵoj”. Kompreneble, ne ĉiuj forfalaĵoj sur la Tero venas el turismo (ĝi eĉ produktas eble nur etan parton de ilia amasa kvanto), sed fakto estas, ke ankaŭ la turismo havas tute certe siajn negativajn tiusencajn kontribuojn. Ni menciuj nur supraĵe kelkajn el ili, eble la plej gravajn:

— konstruo de novaj fervojaj kaj ŝoseaj linioj kaj aliaj trafikaj instalaĵoj forprenas fekundan tergrundon kaj malbeligas la naturan ĉirkaŭaĵon;

— trafikiloj (aŭtomobiloj, fervojo, avia-



Vidaĵo el Ohrid

diloj) faras grandan bruon, ellasas danĝerajn gasojn, mortigas homojn kaj prenas multegan spacon en la urboj dum la nemo-viĝo (aŭtomobiloj);

— ankaŭ la turistoj mem ne estas tute senkulpaj: ili faras bruon (precipe dumnokte), ofte malbeligas vizitatajn vidindaĵojn, postlasas diversajn forfalaĵojn (kompreneble, ili postlasas ankaŭ monon, sed la mono ne estas ĉio, ĉu ne?).

Tio ne estas kompreneble ĝenerala atako kontraŭ turismo, sed nur provo montri ankaŭ la alian „malhelan“ flankon de tiu socia kaj ekonomia aferaĵo. La turismo prezentas tiom da gravaj kaj diversspecaj intereso, ke oni tutcerte ne povas ĝin haltigi aŭ ia ma-

niere bremsi ĝian pluan evoluon. La celo de tiu mallonga eseo estis nur, ekirante de evoluinta ekologia konscio de la homaro, instigi al serĉo de vojo kaj ebleco pacigi tiujn du malsamajn tendencojn: kontentigi amasan homan scivolemon pri aliaj landoj, iliaj naturaj kaj kulturaj vidindaĵoj sub kiel eble pli malgranda ekologia endanĝerigo de tiuj riĉaĵoj apartenantaj al la tuta mondo (kaj ankaŭ al nia posteularo).

Mi proponas al la Konferenco alvoki ĉiujn turistojn en la mondo zorgi pri projekto de la naturaj kaj aliaj vidindaĵoj, ĉar tio estas nia komuna intereso.

mag. Gvozden SREDIĆ,
prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo



Rigardo al tipaj renesancaj konstruaĵoj, plimulto de kiuj devenas de XVIII—XIX jarcento. Vagante tra la malnova urbo, ne nur la fakulo, sed ankaŭ la ordinara vizitanto ĝuas la belan arkitekturon: puraj formoj, majstra kombino de ŝtono kaj ligno. Irante tra la krudŝtonpavimaj stratoj la okuloj de la turistoj kaptas la buntecon de la bonodoraj floroj.

Fotoj: Atanas ILKOV

Nia instruisto Kunčo Vâlev 70-jara

Foje mi vidis afiŝon, kiu anoncis, ke en la Sofia Universitato fakultative estas instruata la internacia lingvo Esperanto kaj mi decidis viziti iun lektion. Enirante la aŭditorion, mi vidis kelkajn studentojn kaj antaŭ ili, ĉe la nigra tabulo, ne tre altan viron kun helaj okuloj, bonkora rideto, kiu inspire klarigis iun gramatikan regulon. La instruisto vekis mian intereson kaj mi atente aŭskultis liajn klarigojn.



Ĉiuj, kiuj konas Kunčo Vâlev, rimarkis, ke li posedas la talenton allogi la studentojn, kaj eĉ hodiaŭ mi ne povas ĝuste difini kiel li sukcesas atingi tion; ĉu dank' al sia melodia voĉo, al sia amika kara rigardo aŭ al sia bonega kono de Esperanto. Sed vere li preparis milojn da esperantistoj en nia lando.

Iom post iom mi pli bone ekkonis mian instruiston pri Esperanto kaj mi eksciis, ke li naskiĝis la 15-an de de-

cembro 1919 en vilaĝo Dobromirka, Gatrova regiono. Jam kiel lernanto en la gimnazio en urbo Sevlievo, li estis socie tre aktiva, prezidis la stenografian societon en la gimnazio, estis sekretario de la gimnazia Esperanto-societo, prezidanto de la redakcia komitato de la bulgarlingva lerneja gazeto „Vâzhod“, aktivis en la agado de legejo „Probuda“ en Dobromirka kaj en la abstinenta societo „Zornica“.

En 1938 Kunčo Vâlev estis unu el la fondintoj de grupo de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS) en Dobromirka. Pro lia aktiva komunistagado li estis plurfoje arestita kaj turmentita en la policejo.

En 1939 li komencis studojn en la Sofia Universitato kaj fariĝis membro de la unuiĝo de la bulgaraj progresemaj studentoj. Post la liberiĝo, en 1945 li komencis studojn kaj finis bulgaran filologion same en la Sofia Universitato. Kelkajn jarojn li laboris kiel instruisto pri bulgara lingvo kaj literaturo en la urboj Pavlikeni kaj Kârĝali, poste estis redaktoro en Radio Sofio, en la eldonejo de la iama Asocio de Bulgar-Sovetiaj Societoj kaj poste en la eldonejo de Patrolanda Fronto. Li redaktis plurajn bulgarlingvajn librojn kaj tradukis ĉirkaŭ 15 librojn de la rusa en la bulgaran lingvon.

Multajn jarojn Kunčo Vâlev estis ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“. Li vere sperte, sindone redaktis la revuon. Mi memoras, ke li ĉiam portis nigran valizeton kaj kiam li havis eĉ kelkajn liberajn minutojn, li tuj sidis ien, malfermis la valizeton, elprenis iun manuskripton kaj komencis redakti. Tamen li ne estis nur redaktoro, sed ankaŭ aŭtoro de pluraj valoraj artikoloj, eseoj, recenzoj. Li posedas ankaŭ la talenton brile paroli, kaj liaj Esperantaj paroladoj estas ĉiam interesaj, allogaj, argumentitaj.

Dum pluraj jaroj Kunĉo Vâlev dediĉis multajn fortojn kaj energion al bulgara Esperanto-movado. Li verkis tri Esperanto-lernolibrojn, pretigis la sintaksan kaj interpunkcian parton de „Gramatiko de Esperanto”, kiun li verkis kune kun Violin Oljanov en 1966. En 1976 aperis (kunaŭtoroj J. Markov kaj I. Sarafov) „Lernolibro de Esperanto por la unua lernojaro”, havanta plurajn eldonojn.

De 1956 ĝis 1960 Kunĉo Vâlev estis prezidanto de la sofia E-societo „Maksim Gorkij”. Li okupis gravajn kaj respondecajn postenojn en Bulgara Esperantista Asocio: 13 jarojn li estis ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto”, 5 jarojn li estis ĉefsekretario,

de BEA. Kunĉo Vâlev plenumis grandan organizan laboron, sed ĉiam anime li estis artisto. Lin forte logas la Esperanto-arto — la literaturo, la teatro, la muziko. Li estis la lingva gvidanto de Bulgara Esperanto-Teatro, por kiu li tradukis kelkajn dramojn en Esperanton. Li gvidas la Sofian Esperantan Literaturan Rondon „Asen Grigorov”, estas prezidanto de la Literatura Seseocio de BEA kaj prezidas la Centran E-Kulturbomon en Sofio, kie li laboras senlace, por ke tiu ĉi domo vere fariĝu centro de la kultura E-laboro en la tuta lando. Samtempe li estas prezidanto de la Kultura Komisiono de BEA, multjara membro de la Buroo de BEA.

La labortago de Kunĉo Vâlev komenciĝas frumatene kaj ofte daŭras ĝis malfrua vespero, sed li trovas tempon por ĉio kaj por ĉiuj. Dum siaj maltrankvilaj kaj streĉitaj tagoj li ne forgesas la poezion kaj li estas unu el la plej aktivaj Esperantaj tradukistoj de bulgara poezio en Esperanton.

Mi povas multe paroli pri mia instruisto Kunĉo Vâlev, pri lia signifa kaj grava E-laboro, sed laŭ mi pli gravas, ke li estas vera homo, ke li ĉiam emas helpi al la homoj kaj por nia kara lingvo li pretas plenumi la plej malfacilajn, la plej respondecajn taskojn. Eble tial mi ne kredas, ke li fariĝis sepdekjara.

Georgi MIĤALKOV

RENKONTIĜO EN PAVLIKENI



La 30-an de septembro kaj 1-an de oktobro 1989 en Pavlikeni — Loveĉ-departemento, okazis la unua esperantista renkontiĝo. Ĝi estis dediĉita al defendo de la paco kaj naturo.

La prezidanto de la societo mallonge konigis al la ĉeestantoj la historion de la urbo kaj ties E-movadon. Sekvis arta programo helpe de societo „Espero” — Gorna Orjaĥovica.

La duan tagon la gastoj trarigardis la troviĝantan apud la urbo antikvan ceramikan tracan centron de la II—IV jc. Oni vizitis la barajlagon „Al. Stambolijski”, riverencis kaj metis ruĝajn rozojn ĉe la monumento omaĝe al Stefan Karaĝa.

Georgi DAALIEV

KATALOGO DE E-ELDONAĴOJ

LERNOLIBROJ

LERNOLIBRO DE ESPERANTO POR UNUA LERNOJARO, Jordan Markov, Kunĉo Vălev kaj Ivan Sarafov. Sofio: Narodna Prosveta, 1982 (dua eldono). 192 p. 21 × 15 cm. Prezo: 0.95 lv./6.60 gld.

Riĉe ilustrita. Precipe taŭga por lernejanaj kursoj. Kun klarigaj notoj en bulgara lingvo, bulgara-Esperanta kaj Esperanta-bulgara vortaretoj.

LERNOLIBRO DE ESPERANTO POR KURSOJ KAJ MEMSTUDADO, Asen Grigorov kaj Violin Oljanov. Sofio: BEA, 1989 (dua eldono). 188 p. 21 × 15 cm. Prezo: 0.90 lv./6.60 gld.

Lernolibro por komencantoj kun klarigaj notoj en bulgara lingvo. Enhavas 35-paĝan legolibron kaj bulgaran-Esperantan kaj Esperantan-bulgaran vortaretojn.

NI LERNU PLU! — KURSO DE ESPERANTO (DUA GRADO), Violin Oljanov. Sofio: BEA, 1976. 138 p. 22 × 16 cm. Prezo: 1.40 lv./5.40 gld.

Progresiga lernolibro en 25 lecionoj. Taŭga por kursa, koresponda kaj aŭtodidakta studado de Esperanto. Ĉiuj taskoj kaj klarigaj notoj estas en Esperanto. Enhavas bulgaran-Esperantan kaj Esperantan-bulgaran vortaretojn.

AL PERFEKTIĜO! — SUPERA KURSO DE ESPERANTO (TRIA GRADO), Violin Oljanov. Sofio: BEA, 1989 (dua relaborita eldono). 104 p. 21 × 15 cm. Prezo: 0.85 lv./6.60 gld.

Lernolibro por kursoj kaj memstudado. Tute en Esperanto. Daŭrigo de „Ni lernu plu!“ de la sama aŭtoro.

INSTRUHELPILOJ

ALBUMO — 66 BILDOJ, Neno Janev. Sofio: BEA. Formato A4. Prezo: 1.47 lv./9.00 gld.

Desegnaĵoj, kiuj ilustras tiklajn momentojn en la gramatiko de Esperanto. Utila por E-instruantoj en elementaj kursoj. Amuza ne nur por infanoj.

DIDAKTIKAJ LINGVAJ LUDOJ, Aleksandr Fjodorov. Sofio: BEA, 1985. 94 p. 21 × 16 cm. Prezo: 0.75 lv./9.80 gld.

Kolekto de lingvaj ludoj, kiuj amuzigas, variigas la insruadon, paroligas la „eternajn komencantojn“ kaj evoluigas la parolkapablojn de progresintoj. Ege valora helpilo — ne nur por E-instruantoj!

EKZERKARO POR ELEMENTA KURSO DE ESPERANTO, Neno Janev. Sofio: BEA, 1985. 112 p. 21 × 15 cm. Prezo: 0.65 lv./6.00 gld.

Riĉe ilustritaj gramatikaj klarigoj por ekzercado kaj evoluigado de lingvaj kapabloj.

POSTKURSAJ LEGAĴOJ, Violin Oljanov kaj Neno Janev. Sofio: BEA, 1985. 146 p. 22 × 16 cm. Prezo: 0.55 lv./9.00 gld.

La legolibro konsistas el originalaj kaj tradukitaj verkoj: anekdotoj, fabeloj, humuraĵoj, rakontoj, versaĵoj k. a. La legaĵoj estas ordigitaj laŭ la facileco de ties lingvaĵo. Tiu libro certe variigos la kursan kaj eksterkursan lernadon de Esperanto.

PROGRAMOJ KAJ REGULAROJ, Sofio: BEA. Prezo: 0.65 lv./3.00 gld.

Nepre konsultenda por bulgaraj E-instruantoj kaj organizantoj de kursoj. Enhavas informojn pri la sistemo de E-instruado en Bulgario.

VORTAROJ

BULGARA-ESPERANTA VORTARO, Asen Grigorov. Sofio: BEA. 208 p. Poŝtfor-

mato 14×10 cm. Prezo: 0.70 lv./5.90 gld.

Plurfoje reeldonita. Tre bona por komencantoj kaj progresintoj.

ESPERANTA-BULGARA VORTARO, Asen Grigorov. Sofio: BEA. 160 p. Poŝformato 13×10 cm. Prezo: 0.60 lv./4.90 gld.

Plurfoje reeldonita. Tre bona por komencantoj kaj progresintoj.

ORIGINALAJ VERKOJ

BELETRAJ ESEJOJ, Georgi Miĥalkov. Sofio: BEA, 1987. 114 p. 20×14 cm. Prezo: 0.45 lv./4.80 gld.

Dek eseoj pri la originala E-literaturo. Temas pri elstaraj E-verkistoj kiel William Auld, Hilda Drezén, Kalman Kalocsay, Eli Urbanova k. a.

MIA VERDA PADO, Ĥristo Gorov. Sofio: BEA, 1986. 184 p. 20×14 cm. Prezo: 0.90 lv./7.50 gld.

Originalaj eseoj kaj rakontoj. Kun biografiaj notoj kaj enkondukita esejo de G. Miĥalkov.

MISTERA LUMO, Julian Modest. Budapeŝto: HEA, 1987, 92 p. 21×16 cm. Prezo: 2.70 lv.

Lirikaj noveloj, verkitaj en facila, tamen nuancoriĉa lingvaĵo.

ROZO KAJ GLAVO, antologio. Sofio: Sofia Press, 1987, 338 p. 22×16 cm. Prezo: 2.05 lv./18.00 gld.

Enhavas verkojn de pli ol 60 bulgaraj E-poetoj el la periodo 1906—1986 j.

VAGANTE TRA LA MONDO MALTRANKVILA; Nadija Andrianova. Budapeŝto: HEA, 1987, 106 p. 21×15 cm. Prezo: 3.90 lv.

Lirika biografio de ukraina esperantisto. La poemaro pritraktas la internacian amikecon kaj la pacsopiron de la homoj.

TRADUKOJ EL LA BULGARA

AMO MIA, Ĥristo Radevski. Trad. Venelin Mitev. Sofio: Sofia Press, 1988. 108 p. 22×16 cm. Prezo: 0.80 lv./5.10 gld.

Elektitaj versaĵoj de konata nuntempa poeto pri diversaj temoj.

APOSTOLO DE LIBERECO — PORTRETO DE VASIL LEVSKI SUR LA FONO DE BULGARIO DE LA 19-A JARCENTO, Mercia MacDermott. Trad. Nikola Aleksiev. Sofio: Sofia Press, 1980. 520 p. 21×15 cm. Bindita. Ilustrita. Prezo: 4.26 lv./17.40 gld.

Biografia romano pri fama revoluciulo el la epoko de la Bulgara Renesanco.

BULGARA NUNTEMPA POEZIO KAJ PROZO, antologio. Kompilis Ĥristo Gorov. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1985. 236 p. 22×16 cm. Prezo: 1.75 lv./15.00 gld.

Bunta panoramo de la nuntempa bulgara literaturo. La antologio enhavas verkojn de 53 poetoj kaj 11 prozistoj.

DE BORDO AL BORDO, Elisaveta Bagrjana. Kunmetis Venelin Mitev. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1988. 100 p. 23×15 cm. Prezo: 0.82 lv./9.00 gld.

Inspira, fajra poemaro de nuntempa bulgara poetino.

ELEKTITA VERKARO, Ĥristo Botev. Trad. Ivan Dobrev kaj Ivan Sarafov. Sofio: Sofia Press, 1986. 84 p. 19×12 cm. Prezo: 0.65 lv./3.90 gld.

Elektitaj poemoj kaj prozaĵoj de unu el la plej grandaj bulgaraj poetoj. Kun klarigaj notoj.

GLACIKOVRITA PONTO, La, Ljuben Stanev, Trad. Asen Grigorov. Sofio: Sofia Press, 1984. 146 p. 20×13 cm. 2.39 lv./6.30 gld.

Romano pri Georgi Dimitrov en nazia malliberejo.

KANTOJ DE MOTOROJ, Nikola Vapcarov. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1987. 120 p. 22×16 cm. Prezo: 1.00 lv./7.50 gld.

Romantikaj socikonsciaj versaĵoj de fama bulgara poeto. Kun enkonduka eseo de Ĥristo Radevski.

RAKONTOJ, Jordan Jovkov. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1986. 284 p. 20×12 cm. Prezo: 1.80 lv./9.90 gld.

30 rakontoj de verkisto-humanisto, simplaj kaj stile brilaj.

RUZA PETRO, Sava Popov, Trad. Koljo Panĉev. Sofio: BEA, 1986. 118 p. 20×14 cm. Ilustrita. Prezo: 0.45 lv./8.90 gld.

Bonhumoraj kaj amuzaj rakontetoj pri fama figuro el la bulgaraj popolaj fabeloj.

SUB LA JUGO, Ivan Vazov. Pluraj tradukintoj. Sofio: BEA, 1982 (ofseta represo de la unua eldono) 21×15 cm. Prezo: 3.20 lv./18.00 gld.

La plej fama romano en la bulgara literaturo, interesa el literatura kaj historia vidpunktoj. Kun antaŭparolo de akad. P. Dinekov.

ŜTELISTO DE PERSIKOJ, Emilian Stanev. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1986. 130 p. 20×12 cm. Prezo: 1.10 lv./6.80 gld.

Du noveloj kaj kelkaj rakontoj de konata bulgara prozverkisto.

TANGO, Georgi Karaslavov. Trad. Nikola Uzunov kaj Petâr Todorov. Sofio: Sofia Press, 1988. 94 p. 23×15 cm. Prezo: 0.85 lv./9.00 gld.

Atentokapta novelo pri du mondkonceptoj.

TRA LA VENTEGO, Ĥristo Smirnenski. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press. 1986 (tria kompletigita eldono). 114 p. 23×16 cm. Prezo: 1.08 lv./7.50 gld.

Poezio kaj prozo de elstara proleta verkisto. Kun ampleksa enkonduko de Georgi Canev.

VILAĜO BOROVO, Krum Velkov. Trad. Asen Grigorov. Budapeŝto: HEA, 1983. 130 p. 20×15 cm. Prezo: 0.79 lv.

Romano pri okazaĵoj en bulgara vilaĝo dum la antifaŝisma ribelo en la jaro 1923.

ALIAJ LIBROJ

STO GODINI ESPERANTO (CENT JAROJN ESPERANTO), Nikola Aleksiev. Sofio: BEA, 1987. 234 p. 21×15 cm. Prezo: 0.35 lv./6.90 gld.

Valora propaganda broŝuro en bulgara lingvo, kiu prezentas la problemon pri internacia lingvo ĝenerale kaj la historion de la E-movado.

ESPERANTISTA KONTRIBUO POR AMIKECO KUN SOVETUNIO: Trad. el la rusa en la bulgaran kaj en Esperanton Nikolao Brezin. Sofio: Sofia Press, 1987. 228 p. 22×15 cm. Prezo: 1.80 lv./5.60 gld.

Historia skizo.

NESTO DE BIRDOJ, antologio. Sofio: BEA, 1987. 238 p. 22×15 cm. Prezo: 1.10 lv./10.80 gld.

Enhavas originalajn kaj tradukitajn verkojn kaj skizon pri la E-movado en Ĥaskovo. Kun multaj fotoj.

TIMUR KAJ LIA TAĈMENTO, Arkadij Gajdar. Trad. el la rusa. Budapeŝto: HEA, 1982. 72 p. 20×14 cm. 1.00 lv./8.10 gld.

Aventura romano; klasikaĵo en la sovetia junulara literaturo.

PERIODAĴOJ

BULGARA ESPERANTISTO, Sofio: BEA. Prezo de unuopa numero de 1987/88 jaro: 0.30 lv./1.50 gld.; la jarkolekto kostas 15.00 gld. Prezo de unuopa numero de 1989: 0.50 lv./3.00 gld. Laŭ interkonsento kun la Unuigita Redakcio ĉe BEA haveblas ankaŭ apartaj numeroj el malpli novaj jarkolektoj.

La revuo estas organo de Bulgara Esperantista Asocio. Ĝi pritraktas problemojn de la landa kaj la tutmonda E-movado kaj konigas al eksterlandanoj la bulgaran historion kaj kulturon. Ekde septembro 1988 ĝi aperas en nova formato kaj pli moderna teknika aranĝo.

JUNA AMIKO, Budapeŝto: HEA (aŭspiciata de ILEJ). Prezo de unuopa numero: 0.60 lv.

Trimonata revuo por lernantoj kaj komencantoj. Gaja enhavo kaj facila lingvaĵo. Haveblas la numeroj 3—4/86, 1—4/87 kaj 1—4/88.

PANORAMA ESPERANTO, Sofio: BEA. Prezo de unuopa numero: 0.50 lv. Nova dumonata bulgarlingva eldonaĵo por informado kaj varbado en neesperantistaj medioj.

GRAMOFONDISKOJ

BULGARA ROZO, kantas Jana Cikalova. Sofio: Balkanton. 30 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 2.30 lv./18.00 gld.

Enhavas 15 esperantigitajn kantojn de nuntempaj bulgaraj komporistoj.

BUNTAJ KRAVATOJ — infana kantgrupo. Sofio: Balkanton. 18 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 0.70 lv./6.00 gld.

Enhavas la kantojn „Infanaj sonoriletoj” kaj „Infanoj de la tuta mondo”.

JUBILEA KONCERTO, kantas Veselin Damjanov. Sofio: Balkanton. 30 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 2.30 lv./24.00 gld.

Sep popularaj operaj kaj operetaj arioj kaj sep originalaj kantoj de la konata esperantisto-kantisto. Kun tekstoj.

KANTAS MIŜO ZDRAVEV. Sofio: Balkanton. 18 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 0.70 lv./6.00 gld.

Enhavas du kanzonojn en Esperanto.

KORUSO DE INSTRUISTINOJ-ESPERANTISTINOJ. Sofio: Balkanton. 18 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 0.70 lv./6.00 gld.

Enhavas „Ni gardu la pacon” kaj „Patrujo”.

NI VIVOS! Julian Modest. Sofio: Balkanton. 30 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 2.30 lv./21.00 gld.

Dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto. Plenumas aktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro.

RIBELA KORDO, Ĥristo Gorov. Sofio: Balkanton. 30 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 2.30 lv./21.00 gld.

Poemoj de konata bulgara poeto-esperantisto.

DIVERSAĴOJ

INSIGNO — emblemo de IEK-Pisanica. Pinglo. 0.40 lv./2.60 gld.

INSIGNO — verda stelo sur blanka cirklo kun orkolora rando. 14 mm. Pinglo. 0.30 lv./2.10 gld.

JUBILEAJ KOVERTOJ — korespondkovertoj kun portreto de Zamenhof. Prezo de 100 kovertoj: 8.00 lv./24.00 gld.

JUBILEAJ MARKOJ — kun portreto de Zamenhof kaj jubilea simbolo. Prezo: 0.13 lv./3.00 gld.

PLAKATO — multkolora portreto de Zamenhof. Formato A3. Prezo: 0.32 lv./2.60 gld.

ŜLOSILTENILO el ledo. Prezo: 2.50 lv./7.50 gld.

Bulgaroj povas aĉeti ĉiujn titolojn en la Librovendejo de BEA aŭ mendi ilin ĉe la Unuigita Redakcio de BEA. La Unuigita Redakcio sendas poŝtrepago (s naloĝen platej) librojn, gramofondiskojn ktp., se sume ili kostas pli ol 10 lv. Oni indiku klare: 1. propran, gepatran kaj familian nomon; 2. adreson kaj telefonnumeron; 3. titolon; 4. kvanton.

Eksterlandanoj mendi la bulgarajn E-eldonaĵojn ĉe UEA.

Laŭ interkonsento eblas interŝanĝo de libroj kaj esperantaĵoj inter la Unuigita Redakcio kaj E-asocioj aŭ libroservoj.

Adreso: Unuigita Redakcio ĉe BEA.

1000 Sofio, P. K. 66, tel. 22 80 86


80-jara jubileulo

Onklo Goŝo — tiel mi memoras lian nomon de mia plej frua infaneco, de la tempo, kiam mi havinte kvar jarojn recitis en Esperanto dum kunveno de esperantistoj en mia naskiĝurbo Ĥaskovo. En tiu tempo, eble ankoraŭ eĉ nekonscie, sed poste jam tute konscie, li fariĝis por mi simbolo de homo, dediĉinta sian vivon al Esperanto, fidela al la ideo kaj tutkore laboranta por la progreso de la movado. Pro tio ĉi-jare, post la 80-a jubilea naskiĝtago lia — venis al mi la ideo skribi kelkajn liniojn pri li.

Georgi Idakiev naskiĝis en vilaĝo Kasilak, regiono de Radomir, la 10-an de junio 1909. Ankoraŭ kiel 16-jara lernanto, aktiva membro de la societo pri abstinenco, li konatiĝis kun la ideo de Esperanto, tuj favore enamiĝis en ĝin kaj eklernis la lingvon.

En 1935 Georgi Idakiev estas laboristo en la minejo de Pernik, poste li fariĝas brigadestro. Post 1944 li aktivas en la sindikata kaj popolfronta movadoj. Lia talento de organizanto igas lin agi kaj en 1945 li fariĝas iniciatinto de fondiĝo de E-societo en Pernik.

En 1951 Idakiev ekloĝas en Ĥaskovo, kie li estas ankoraŭ nun. En 1956 li petas de CK de BEA — Sofio, liston de la esperantistoj en



Ĥaskovo. Ricevinte la nomojn de dek personoj li komencas ilin serĉi. La fina rezulto estas ne tro esperiga — nur du personoj restis en la urbo... Kun la valora subteno kaj helpo de la sekretario pri propagando en Distrikta Komitato de BKP — Dinko Atanasov, kolektiĝis ses personoj, kiuj fondis E-societon „Asen Zlatarov“. La iniciatinto restas sekretario-kasisto de la societo. En 1960 li estas elektita kiel prezidanto kaj ĝis 1967 plenumas tiun taskon kun sento pri respondecado kaj sindono.

Idakiev ne nur gvidis la laboron, sed li mem estis inter la plej aktivaj esperantistoj. Li agadis en la distrikto de Ĥaskovo. Frukto de lia fervoro estis la fondiĝo de E-societoj „Ruĝa Aŭroro“ en v. Uzunĝovo (fond. en 1960) kaj „Juneco“ en v. Kapitan Andreevo (fond. en 1964).

De 1962 ĝis nun li estas membro de Centra Estraro de BEA.

En 1966 estis fondita Distrikta Estraro de BEA, kies prezidanto dum 18 jaroj denove li estis. Motoro de la organizaĵo li estis kaj per sia pionira laboro gajnis la subtenon de multaj distriktaĵoj kaj urbaj aŭtoritatuloj rilate al Esperanto. Li ĉiam helpis la societojn en solvo de iliaj problemoj, veturis en la distrikto por organizi kursojn, en kiuj kreskis la fervoraj posteuloj en lia amata E-movado.

Lia E-agado ne restis nur en kadre de la distrikto, ĝi transpasis la limojn de nia lando kaj gajnis amikojn de nia lando el Japanio, Aŭstralio, Svedio, Norvegio.

Kaj jen — jam dum 63 jaroj onklo Goŝo laboras por Esperanto. Mi certas, ke eĉ por momente li ne disiĝis kun la amo al Esperanto, kun la penso kion fari por disvolvi kaj propagandi ĝin, por gajni novajn adeptojn, edukante ilin per sia ekzemplo.

Li estas distingita per ordeno „Kiril i Metodij“ — II grado, ora medalo „100 jarojn Esperanto“, ora jubilea insigno de BEA, medalo pro aktiva agado en Nacia Komitato pri Pacdefendo.

Je la nomo de tiu juna generacio, kiu havis la eblecon kreski apud li kaj observi lian sindonan laboron kiel modelo, mi volas diri tutkore: „Dankon, onklo Goŝo!“

Mariana ELENOVA



**Originala
verkaro**



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

Ĉi-jare la tradicia, 9-a Esperantista Renkontiĝo „Siringa Vespero“ en Loveĉ altiris multajn esperantistojn el la tuta lando, kiuj venis konatiĝi kun la gastiganta urbo kaj ĝui la esperantistan etoson. Pri la renkontiĝo jam aperis informo en n-ro 7/1989 de „BE“. Nikola Pilev el Ĥaskovo verkis „Kanto-n pri „Siringaj Vesperoj“, kiun la organizantoj de la estontaj tradiciaj renkontiĝoj intencas uzi enkadre de la programo. Tial la Redakcio de „BE“ anoncas konkurson pri kompono de muziko akompane al la teksto. Limdato de ricevo de la konkursaĵoj 30.04.1990.

Nikola PILEV

KANTO PRI „SIRINGAJ VESPEROJ“

*Denove printempo torentas sur Tero
kaj ventas karese la blua tenero.
En Loveĉ¹ siringoj disfloras
en koroj esperoj sonoras.*

*Granito de Levski² ĉielon apogas.
Là pont' pitoreska amike nin logas.
Varoŝa³ konfidas rakonton.
De l' ĉarmo ni trovas la fonton.*

*Aero tremplenas, okuloj serenas.
Amikoj kun steloj amase kunvenas
kaj faras stelaron sur Tero
en tiu siringa vespero.*

*Ho, verda anaro, se volas vi kreski
alprenu honeston kaj kredon de Levski,
absorbu siringajn aromojn
kaj donu ĝin varme al homoj.*

¹ urbo en Nord-Bulgario

² bulgara nacia heroo (1837—1873)

³ malnova kvartalo de Loveĉ

Anneke BUYS (Nederlando)

MALKONKORDA

??

Neniu respondo

!!!

Silento.

*Vortoj eĥigas,
rompiĝas sur mian kapon;
tranĉantaj splitoj
sur mia lango...*

*La silento envolvas nin —
en tiu ĉi domo
ankoraŭ parolas nur
la horloĝo.*

* * *

*Ploranta infano
rapide preteriras:
ĝi estas tre malgranda
sed tial la ĉagreno
ne pli malgrandas.*

ANTIFONO

*La malfrua kanto
de birdo,
superbruata
de muziko;
voĉo plendas:
„daŭras la amo
tiel mallonge,
sed la birdo
kantas kontraŭe:
„daŭras la amo
vivolonge,
daŭras nur tiu vivo
tiel mallonge.”*

Cvetanka UZUNOVA

VIVOSENCO

*Tutan nokton regis uragano:
estis tondroj, fulmoj. Pluvis,
kaj matene bona civitano
kverkobranĉon de la tero levis.*

*Grimpas alpisto rok-deklivon.
Falas. Pli nenio estas.
Jen karulo jena lasas vivon —
vundo en animo restas.
Venas ombro — de la
mort' — fianĉo —
diafana kaj grizhara.*

*Sen la patro-arbo mortas
branĉo,
vivas la radik' multjara.
diafana kaj grizhara.
Sen la patro-arbo mortas
vivas la radik' multjara.*

*Homo nin forlasas, iu venas
kaj la spuron daŭrigas.
Lian nomon la popolo benas
vivosencon memorigas.*

6.IV.1989



Oazis'89



Fotas esperantisto fotisto Kiril Kalčev
Foto: Veneta DIMITROVA

La artistoj ŝatas la aŭtunon. Eble vi rimarkis, ke ĉiuspecaj artaranĝoj komenciĝas tiam. Evidente la mistero de ĉi sezono, de ĝia vualita suno kaj lanugaj nuboj, de la bunteco de koloroj sur la arboj kaj de ekstanta ekvilibro en la homanimo post la pasia somero efikas fruktodone al la sentema animo artista.

Jen pro kio ankaŭ la tradicia renkontiĝo de fotistoj-profesiuloj kaj amatoroj ĉe Nigra Maro, por oka fojo okazas septembre.

De la 10-a ĝis la 16-a de septembro 1989 la ŝaŭmantaj marondoj kaj la soleca trankvilo de feriloko „Oazis“ allogis pli ol 250 fotistojn el Bulgario kaj eksterlando. En la programo estis konkursoj pri subakva fotado, plej bona lumbildo farita surloke, netradicia fotaĵo k. a. Ĉiutage oni povis trarigardi almenaŭ unu novan ekspozicion de fotaĵoj — aŭ en la speciala halo, aŭ simple pendigita sur ŝnuro per kroĉiloj, aŭ algluita al la muroj de „bungalow“. Intereson vekis la partoprenantaj firmaoj „Kodak-Pathe“ (Francio), „Jobo“ (FRG) kaj „Promexport“ (USSR), kiuj disponis pri apartaj reklame-

joj por prezenti sian produktaĵon.


Por unua fojo la organizantoj el Klubo de Bulgaraj Fotistoj (KBF) invitis dekpersonan grupon da fotistoj-esperantistoj kiel reprezentantojn de la nacia ILEF-sekcio.

Dum la bonveniga konversacio inter prezidanto de KBF, Stefan Lanĵev kaj prezidanto de Bulgara ILEF-Sekcio Dončo Ĥitrov kaj ĝia sekretario Veneta Baleva, estis emfazite, ke estonte oni devas plifirmigi la kontaktojn inter la du organizaĵoj kaj gastu reciproke al ĉiuspecaj aranĝoj, kio helpos por ties variigo kaj estas ankaŭ formo de interŝanĝo de sperto. Okazis renkontiĝo de St. Lanĵev kun ĉiuj esperantistoj, dum kiu estis pritraktita plano pri estonta kunlaboro.

Malgraŭ ke la vetero malvarmis kaj ofte pluvetis, la fotistoj pasigis kelkajn tagojn en streĉa krea laboro, strebante kapti ĉiujn intereskaptajn momentojn, embuskante kun fotokamerao enmane por registri ĉiun neforgeseblan travivaĵon.

Ĝis la sekva aŭtuno, kolegoj!

Veneta BALEVA



Promenado laŭ rivero Ropotamo
Foto: Ĥristo NIKOLOV



Foto de la numero: Rememoro pri la somero

Foto: Ĥristo NIKOLOV

ESPERANTA INSTITUCIO

Ludoviko Zamenhof ĉiam refutis, ke li estas aŭtoro de Esperanto. Li diradis, ke li estas nur ĝia iniciatinto. Tion Zamenhof opiniis ne pro la vaste konata lia modestecco, sed pro la firma konvinko, ke Esperanto ne devas esti monopoligita de unu persono aŭ grupo. La lingvo devas evolui libere same tiel kiel evoluas la etnaj lingvoj.

Esperanto, same kiel la naciaj lingvoj havas diversajn instituciojn, kiuj okupiĝas pri la lingvo. La plej supera inter ili estas Akademio de Esperanto. Ĝiaj celoj kaj taskoj estas: 1. Konservi kaj protekti la lingvon Esperanto laŭ ĝia Fundamento kaj kontroli ĝian evoluon; 2. Esplori ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton; 3. Kritiki verkojn el lingva vidpunkto; 4. Defendi Esperanton kontraŭ ĉiaj konkurencoj.

La Akademio havas jenajn sekciojn kaj komisionojn: Teknika vortaro, Gramatiko, Ĝenerala vortaro, Literaturo, Prononcado, Akademaj aproboj de fakaj terminaroj kaj Akademio kaj landaj institutoj.

Bulgara Esperanta movado kaj ties organizo — Bulgara Esperantista Asocio, urĝe

bezonas havi lingvan institucion — komitaton aŭ instituton, kiu kunlabore kun la Akademio de Esperanto zorgu pri la konservo, protekto kaj evoluo de Esperanto en Bulgario. Nun tiuj problemoj estas aŭ neglektataj aŭ solvataj arbitre. Ekzemple antaŭ nelonge mi konstatis, ke en eksterlando nia vorto „seliŝte“ ne estas tradukata per „loĝloko“, sed per „setlejo“. Pri tio mi skribis al revuo „Bulgara Esperantisto“. La redakcio ne povis trovi personon, kiu kompetente respondu pri la starigita demando kaj pro tio ĝi ne estis aperigita. Nun estas kompilataj grandaj vortaroj kaj oni strebas verki kelkajn fakajn terminarojn, kiuj estas ege bezonataj. Same kiel pri la aperigo de alia literaturo en Esperanto, pri la lingvaĵo en ili arbitre decidas la aŭtoroj kaj la redaktoroj de la verkoj.

La stablo de Lingva Instituto de Esperanto en Bulgario povus multe kontribui por la evoluo kaj progreso de la lingvo. Ĝi ankaŭ povus multon fari por plibonigo de la lingvoscio de la bulgaraj esperantistoj.

Nikola NIKOLOV

Pri lingva instituto kaj la neologismoj

N. Nikolov proponas fondon de Lingva instituto. Anticipe mi sciigas, ke mi estas adepto de tia instituto, eĉ mi partoprenis en la malnova, fondita kaj organizita en la 50-aj jaroj de la neforgebla Asen Grigorov. Tiam ekzistis en Sofio kaj en iuj aliaj loĝlokoj de la lando sufiĉe forta esperantologia grupo kaj la tiama Lingva instituto havis sian personan bazon, kiu certigis al ĝi vivon kaj aktivecon. Krom Asen Grigorov mi povus mencii

tiajn elstarajn esperantologojn — lingvistojn, literaturistojn, pedagogojn — kiel prof. d-ro Stojan Ĝuĝev, Atanas D. Atanasov-ADA, Simeon Ĥesapĉiev, Simeon M. Simeonov, Stefan Masarov, Stefan Kiraĝiev, Stefka Ĥristova, Canko Murgin k. a. Ĉiuj ili sub la talenta organiza gvido de Grigorov kontribuis por la sukcesa agado de la instituto kaj ties sekcioj. Bedaŭrinde, novaj estroj, okupintaj la gvidadon de BEA post 1960 ne havis dis-

poziciojn por teoria laborado, ne komprenis la utilon de la instituto kaj malfondis ĝin.

Antaŭ kelkaj jaroj mi iniciatis kreon de Instituto pri Esperantologio kaj Interlingvistiko. Mi kunvokis fandan kunvenon, en kiu partoprenis prof. St. Ĝuĝev, prof. K. Popov, prof. M. Marinov kaj kandidato de la fiz. sc. Daniela Deneva. La kunveno akceptis statuton de la instituto kaj elektis estraron. Tamen la tiama prezidanto rifu-

zis konfirmon de la instituto.

Nun la cirkonstancoj — subjektivaj kaj objektivaj — estas pli favoraj. Denove aperas ĉe iuj talentaj junaj esperantistoj signoj pri interlingvistiko kaj esperantologio. Ni esperu, ke iu prenus la iniciaton.

N. Nikolov tamen en la sama artikolo allasas kontraŭdiron. Dum li asertas, ke BEA „urĝe bezonas havi lingvan institucion, komitaton aŭ instituton, kiu kunla-

bore kun la Akademio de Esperanto zorgu pri la konservado, protekto kaj evoluo de Esperanto...”, tuj proponas enkondukon de la angle devena vorto „setlejo” anstataŭ la vorto „loĝloko”. Kial? Mi ne vidas kaŭzon forpuŝi la regule formitan laŭ la Esperanta vortfarado vorton per fremda vorto. Krome, la neologismo „setli” havas alian signifon. En la Suplemento de PIV ĝi estas interpretita jene: „Ekloĝi, instali sin en

nova loko, regiono aŭ lando”. Do, „setlejo” aŭ „settlement” signifas „kolonio” (laŭ la 5-a signifo en PIV). En Angla-Esperanta Vortaro „settlement” estas tradukita „kolonieto”.

Ni devas esti atentemaj al similaj enŝovoĵoj de okcidenteŭropaj (precipe francaj kaj anglaj) vortoj en Esperantajn tekstojn.

Violin OLJANOV,
vicprezidanto de la Akademio
de Esperanto

Novà estraro de Akademio de Esperanto

La 1-an de oktobro 1989 estis elektita nova Estraro de la Akademio de Esperanto: prezidanto — d-ro André Albault (Francio), vicprezidantoj — d-ro Werner Bormann (FRG) kaj Violin Oljanov (Bulgario), sekretario — s-ro Jean Thierry (Francio).

Estis reelektitaj ĝisnunaj direktoroj de la sekcioj kaj komisionoj.

VORTKREAĴOJ

En nia ĉiutaga vortaro ĉeestas vortoj, kiuj apartenas al tiel nomata internacia leksiko. Iuj el tiuj vortoj estas kreaĵoj de elstaraj personoj en la belliteraturo, scienco kaj tekniko. En siaj verkoj ili uzis vortojn, kiuj poste restis por ĝenerala uzo en la koncerna fako. Iom post iom la kreitaj vortoj disvastiĝis ekster la limoj de la koncerna lando kaj okupis firman lokon en la internacia leksiko de la lingvoj.

La kreado de „ĝusta” vorto kaj ĝia aktiva uzado estas malfacila, sed respektinda afero por la aŭtoro de la vorto. La granda rusa verkisto I. S. Turgenev estis fiero, ke el-

pensis la vorton **perspektivo**. La vorto **intelektularo** estas patentito de P. Boborkin, **akustiko** — de la franco J. Sonjor (1653—1716), **hidraŭliko** — de la angla kemiisto Robert Bojl (1627—1691), **hidrodinamiko** — de la peterburga akademiano Daniil Bernuli (1700—1780), **balistiko** — de la franca sciencisto Maren Mersen (1588—1648), **elektrotekniko** — de la germana inventinto Werner Siemens (1816—1892), **ekologio** — de la germana biologo-evoluciisto E. Hekel (1834—1919).

Antoaneta NIKOLAEVA

Vanga

Krasimira STOJANOVA

(Daŭrigo de n-ro 11/89)

Vanga estas bonega diagnozisto kaj kuracisto. Kontraŭ diversaj malsanoj ŝi rekomendas drogherbojn kaj aliajn simplajn rimedojn, kiuj havas rapidan pozitivan efikon. La konsiloj de Vanga ĉiam koncernas konkretajn personojn kaj ne estas blinde plenumebraj de ĉiuj.

Jen okazoj el ŝia kuracista agado:

- Venis juna homo, fosmaŝinisto, kiu gratvundis sian genuon ĉe senakvigo de marĉo. Ekde tiam lia kruro ŝvelis kaj pusiĝis, kaj la kuracistoj diris, ke ĝi devas esti amputita. Sed la konsilo de Vanga estis alia — oni trovu ranon, prefere el la sama marĉo; oni senhaŭtigu la ranon kaj kovru la vundon per la haŭto. La homo sekvis tiujn konsilojn kaj dormis nevekeble dum du tagnoktoj (antaŭe li tute ne povis dormi sen grandaj dozoj da dormigaj medikamentoj). Kiam li vekiĝis, la bandaĝo estis falinta, kaj sur ĝi estis ŝlimaĵo (kvazaŭ el furunko). Post unu semajno la vundo saniĝis, kaj la kruro estis savita.

Mi tre miris pri tiu kuracilo, sed poste mi legis en naturscienca revuo, ke la haŭto de la rano enhavas substancojn, kiuj neŭtraligas eĉ plej fortan venenon de serpento kaj sava la vivon de la rano post mordado.

- Antaŭ nelonge mia frato Dimităr eksentis akran doloron, kiu ne lasis lin ekdormi vespere. Li vizitis kuraciston, kiu diris, ke tio estas osta elkreskaĵo, kaj la kuracado estas malfacila kaj tre longdaŭra. Foje li petis Vanga-n pri konsilo. Ŝi rekomendis al li pistpulvorigi du paketojn da incenso kaj miksi tion kun 50 gramoj da poma vinagro, poste ŝmiri la miksaĵon sur lanan tukon kaj surmeti ĝin sur la vundon dum tri sinsekvaj vesperoj. Tiam la doloro malaperis.

- Amiko el Petriĉ havis samspecan doloron, sed al li Vanga rekomendis ion alian: trempi lanan tukon en benzino, surmeti ĝin sur la vundon kaj meti super ĝi elteneble varmigitan kupran telereton. Li faris tion trifoje, kaj la doloro malaperis.

- M. T. el Petriĉ havis verukon, kiun ŝi foje senpripense skrapis. Post unu semajno ĉie sur ŝia korpo ekaperadis verukoj. Vanga konsilis al ŝi pisti delfinion kaj surŝuti ĝin sur la unuan verukon. Poste ĉiuj verukoj malaperis.

- K. S. el Ruse havis astmomalsanan infanon, pro kiu ŝi devis loĝi en Sandanski. Vanga konsilis al ŝi pluki 30 foliojn de la kuracherbo tusilago kaj bone sekigi ilin. Poste la virino alportis lilin kune kun duonlitro da brando. Vanga tenis ilin nelonge en siaj manoj kaj diris al la patro, ke li trempu la foliojn en la brando kaj surmetu ilin sur la bruston de la infano. Post tiu terapio la atakoj de la malsano ĉesis.

- K. B. havis de multaj jaroj internajn hemoroidojn kaj ne povis saniĝi. Vanga konsilis al li uzi blankan viskon kreskantan sur pino (tio estas interesa parazita planto, kiu kreskas nur sur la ŝelo de diversaj arboj; se la semoj falas sur la teron, ili pereas). Poste li rompis splitaĵojn de la planto kaj metis ilin en glason da akvo. Matene li trinkis la akvon. La hemoroidoj malaperis.

- A. P. el Sandanski havis diabeton en komenca stadio. Laŭ konsilo de Vanga li alportis al ŝi ĉirkaŭ tri kilogramojn da guŝoj de matura fazeolo. Ŝi nelonge tenis tion en la manoj kaj poste diris al li boligi la guŝojn kaj trinki de la dekoktaĵo po unu tetason antaŭ la matenmanĝo.

- Kontraŭ iktero (flavmalsano) Vanga rekomendas tre simplan kuracilon, kiu kuras por tri tagoj. Tuj kiam oni rimarkas la malsanon, oni devas trinki matene la sukon de unu citrono kun unu tekulereto da natria bikarbonato. Oni trinku tion antaŭ la matenmanĝo.

- Ŝi konsilis al juna leŭkemiulo trinki la akvon, en kiu estas boligitaj tritikaj, maizaj, avenaj, sekalaj kaj miliaj grajnoj. Post ne longe la junulo informis nin, ke li sentas sin bonege kaj plipeziĝis je 5 kilogramoj.

- Alia junulo svenadis, kaj oni pensis, ke li malsanas je epilepsio. Vanga diris, ke unu nervo estas premita kaŭze de falo. Ŝi rekomendis al li trempi tukon en miksaĵo de oliveo kaj fandita vakso kaj alglui ĝin laŭlonge de la vertebraro. La svenado ĉesis.

- Al virino, kies ungoj defaladis pro micozo, ŝi konsilis boligi fortan kafon kaj du-tri-foje teni la fingrojn en ĝi.

- Al viro, al kiu oni sensukcese faris operacion de la inflamiĝintaj pro infekto limfotondoj, Vanga diris, ke li devas konsulti ne kirurgon, sed dentkuraciston, ĉar — laŭ ŝi — la malsanon kaŭzas la maloportuna dentoprotezo.

- Kiam la gefratoj de Vanga en sia infanaĝo malsanis je malario, ŝi kuraris ilin tiumaniere: Ŝi metis en puran emajlan ujon en sunluma loko unu freŝan kokinan ovon kaj 200 gramojn da pura vinagro. Ĝis la sekvonta mateno la ŝelo de la ovo solviĝis. Tiam ŝi bone kirlis la likvaĵon kaj trinkigis la infanojn per ĝi antaŭ la matenmanĝo.

- Se iu veneniĝis per fiŝo, Vanga konsilas, ke li tuj trinku kuleron da anizbrando en glaso da akvo.

Kaj tiel plu, kaj tiel plu.

Mi ne kompetentas pri drogherboj kaj kuracado, pro tio mi ĉesas. Estas miloj da okazoj, kiuj pruvas la kuracistajn kapablojn de Vanga. Ŝiajn scipovojn devas pritaksi la fakuloj. La supre menciitaj ekzemploj estas nur pala ilustro de ŝia ĉiufanka agado.

Nun ni kune demandu Vanga-n: Kiel la

homo konservu tiun valoregan donacon — la sanon?

Ŝi respondas: „Estas tre simple. Mi ne havas specialajn rekomendojn, kaj ĉiu el vi scias, kion oni ne devas fari. Antaŭ ĉio: ne manĝu tro! La nutraĵo ja jam malboniĝis pro multaj sterkaĵoj, kaj krome la organoj de la homa korpo superŝarĝiĝas de la troa manĝado. Ja se ni devus tiom multe manĝi, la naturo estus doninta al ni po du stomakojn, kaj ne nur po unu... Mi ofte diras: Vi devas semi pli da sekalo; la homoj devas manĝi seĝalpanon por konservi sian sanon kaj por travivi. Por la nuna tempo la sekalo havas grandan signifon.

Trinku ofte teon de arbaraj plantoj! Manĝu malmulte da graso! Tiuj, kiuj estas sanaj, manĝu malpli da viando kaj iom post iom absolute rifuzu ĝin! Manĝu almenaŭ foje semajne boligitan tritikon kaj trinku la akvon, por ke vi havu forton.

Ne fumu!

Vi povas trinki antaŭ manĝado nur po 20—30 gramojn da brando — por desinfekto. Moviĝu pli kaj laboru! Enlitiĝu frue — je la 22-a horo, kaj ellitiĝu frue — je la 5—6-a horo; tio estas plej konvena tempo por bone ripozi kaj por ne esti nervoza kaj streĉita.

Somere iru nudpiedaj! Ne interrompu la kontakton kun la tero!

Lasu la infanojn somere nudaj kaj nudpiedaj! Ili malpuriĝu, ili ludu ĉie, por ke iliaj organismoj poste povu defendi sin kontraŭ ĉiuj vintraj malsanoj. Ilia manĝaĵo estu precipe likva. Ne punu la infanojn per seka manĝaĵo!

Respektu la purecon kvazaŭ kulton! Ne banu vin per tro varma akvo, uzu prefere simplajn sapojn. Atentu, ĉar multaj nekornataj malsanoj aperos. La homoj falados surstrate sen klara kialo kaj sen esti videblaj malsanaj. Sed tion vi ankoraŭ povas preventi, ĉar ĝi estas tute en viaj manoj.

(Daŭrigota en n-ro 1/90)

Vivĝojaj vintraj popolkutimoj

En la vintra popolkutima ciklo de la bulgara popolo gravan parton okupas la kutimoj **kristnaska bondezir-kantado** kaj **novjara gratulado**. Pro sia riĉa simboleco de bildoj, distra spektakleco kaj ebleco elmontri propran kreokapablon kaj artan talenton de la partoprenantoj, ili estas unuj el la plej vivĝojaj kaj sopire atendataj popolkutimoj ankaŭ en nia nuntempo.

Kristnaskaj bondezir-kantadoj estas plenumataj en tuta Bulgario. En ili aktive partoprenas junaj kaj plenaĝaj kantantoj, kiuj en taĉmentoj vizitas domojn en la vilaĝoj, escepte de iuj lokoj en Sud-Okcidenta Bulgario, kie plenaĝaj kantantoj ne estas.

La kantantoj formas taĉmentojn havantajn ĝis dek anoj. Unu el ili estas gvidanto (bulg. stanenik). Alia devas porti la ricevitajn donacojn: li portas dusakon surŝultre. La gvidanton oni elektas antaŭ Kristnasko, li devas esti sperta kaj scii bone la Kristnaskan benon (bulg. blájenka), samkeil la necesan kant-repertuaron (iuloke ĝis 80 kantoj). La plenaĝaj kantantoj estas feste vestitaj kaj ekipitaj per bastonetoj (bulg. koledarki). La gvidanto portas rondan lignobotelon. En vilaĝo povas esti kelkaj taĉmentoj, kiuj distribuas inter si la vizitendajn domojn en la tago de Sankta Vespero (24-a de decembro) posttagmeze. La vizitado okazas nokte — la suno ne devas trafi la kantantojn survoje.



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

Post la salutoj de la familianoj en la koncerna domo la kantantoj plenumas ĥore „Kanton pri la domo“. Tiu kanto estas glorado al la bonstato de la domo, al la familio kaj bondezirado pri sano. Laŭ deziro de la dommastroj oni prezentas kantojn pri iuj familianoj — pri junulo, pri junulino, pri eta infano, pri metiisto, pri agrikulturisto, pri ŝafisto k. a. Ĉiuj kantoj esprimas la sopirojn de la koncerna persono. La pli lertaj kantantoj eĉ improvizas tiurilate.

Al la kristnaskaj kantantoj oni donacas speciale bakitan ringopanon kaj monon. Krome oni donas al ili donace lardon, fromaĝon kaj alispecan nefastaĵon. La gvidanto de la taĉmento prenas la donacojn kaj esprimas sian benon (bulg. blájenka), kiu ofte estas tre longa kaj ĉiam humurlaŭda. Li eldiras ĝin recitative, finante ĉiun strofon per sama admono: „Diru, taĉmento, amen!“ kaj taĉmento respondas. La recitado finiĝas per la bondeziroj:

*„Kiom da steloj sur la ĉielo,
tiom da sano en tiu hejmo!“*

Specife Novjara popolkutimo estas la **novjara gratulado**, kiu de antikva tempo ĝis la mezo de la XX jc. estis plenumata de junula taĉmento, kiu antaŭ Novjaro vizitas la domojn, kie frapas per kornusbranĉeto la familianojn kaj benas ilin. La farataj de la taĉmentanoj agoj estas tipe magiaj. Laŭ la tradiciaj imagoj la celo estas certigi abundan rikolton kaj sanon dum la venonta jaro. La junuloj uzas maskojn de antropomorfa kaj zoomorfa speco.

Nun plu funkcias nur la popolkutima gratulado plenumata de knaboj ekde plej junaj ĝis 15—16-jaraj. Ili estas ekipitaj per freŝaj kornusbranĉetoj (bulg. survaĉki), kiujn oni ornamas per moneroj, kringoj, bakitaj maizgrajnoj, buntaj rubandoj kaj papfolioj. La 1-an de januaro matene ĉiu knabo frapas per kornusbranĉeto siajn gepatrojn kaj aliajn hejmanojn kaj bondeziras:

„Feliĉan, feliĉan Novjaron!

Ĝojan jaron!

*Plenan spikon sur maiztrunko,
ruĝajn vinberojn en vitkampo
kaj flavan cedonion en ĝardeno...*

Plenan monujon...

*Feliĉan, feliĉan Novjaron,
ĝis la sekva Novjaro sanon,
ĝis la sekva kaj postsekva!”*

Pro la bondeziroj al la knaboj oni donacas monon, kringojn, sukerpecojn k. a. Ordinare la knaboj vizitas, sole aŭ gvidate de pliaĝuloj, najbarojn kaj aliajn gekonatojn kaj parencojn por gratulfrapi ilin.

La bulgaraj vintraj popolkutimoj grandparte signas la komencon de la Novjaro kaj pro tio havas en sia esenco karakteron de popolfestoj, en kiuj oni eldiras ĝeneralajn kaj konkretajn bondezirojn pri sano, abunda rikolto, bonstato kaj pri familia kaj persona feliĉo. La vintraj popolkutimoj kun sia varieco kaj regiona specifeco estas farataj ordinare en la vilaĝoj, sed ankaŭ ofte en urboj. La popoltradicio plu vivas kaj havas firmajn radikojn.

Evgeni GEORGIEV

En la centra gazetaro

Kiel daŭre altiri la atenton kaj intereson de la amas-komunikiloj al Esperanto kaj la E-movado? Tiu problemo estis ĉiam grava, sed nun ĝi estas aktuala pro la reorganizo en la movado, la stilo kaj laboro de Bulgara Esperantista Asocio kaj precipe en la bulgara E-movado. La celo de la reorganizo estas realigi pli altan gradon de utilo kiel por la agantoj tiel por la movado mem kaj ankaŭ por nia nacia kulturo. Tiucele estis organizita Gazetara Servo ĉe BEA. Al ĝi apartenas profesiaj ĵurnalistoj, membroj de la Asocio. Tasko de la Gazetara Servo estas pliaktivigi kaj plilarĝigi la kontaktojn kun la amaskomunikiloj enlande kaj eksterlande: gazetaro, radio, televido.

Multsignifa estas la iniciato de la Centra Estraro de BEA, kiu jam havas interkontraktajn rilatojn kun la redakcio de la populara tag-ĵurnalo „Oteĉestven Front“ (Patrolanda Fronto). Laŭ tiu ĉi kontrakto depost marto ĉi-jare en ties redakcio laboras ĵurnalistoj, komisie de BEA. En la periodo de marto ĝis oktobro en la gazeto aperis 16 artikoloj, raportaĵoj, intervjuoj, informoj ktp. Estas pritraktitaj diversaj aktualaj temoj: la ĉi-jara februara plenkunsido de BEA; XX Nacia Revuo de Esperantaj Kanto kaj Parolo; Internacia Konkurso-Recitalo de Boteva kaj Bulgara Revolucia Poezio en Esperanto, la tradicia renkontiĝo „Siringa Vespero“; Kvaraj Esperantaj turismaj tagoj en Sofio; Tridekjara jubileo de Bulgara E-Teatro; Tria Balkanlanda Esperanto-Konferenco ktp.

Laŭ ekzemplo de „Patrolanda Fronto“ ankaŭ aliaj tag-ĵurnaloj kaj revuoj publikigas priesperantajn artikolojn. Aperis grandkvante materialoj en ĵurnaloj „Rabotniĉesko Delo“, „Veĉerni Novini“, „Narodna Mladeŝ“, „Narodna Kultura“ kaj „Aprilsko Delo“.

Esprimplena sukceso estas la aliĝo — por unua fojo — de semajnaĵurnalo „Srednoŝkolsko Zname“ al Esperanta temaro. Tiu ĉi gazeto estas organo de Centra Komitato de Komsomolo. Per ĝi oni povas enpenetri pli amase en la mezlernejojn, kie ni varbas novajn adeptojn por nia afero. Laŭ la subskribita kontrakto la gazeto havas konstantan rubrikon „Esperanto“. Jam estas publikigitaj ses materialoj. Inter ili tri raportaĵoj: pri la XX Revuo de E-Kanto kaj Parolo, pri la studado de Esperanto en 8-a sofia mezlernejo kaj pri la internaciaj E-Kongresoj en Brajtono kaj Kerkrade.

Estas ege necese, ke la Esperanta temo eniru kaj daŭre restu en la gazetaro en fremdaj lingvoj, aperanta en Bulgario. Ĝi havas legantojn en ĉiuj kontinentoj. Ekzemple la fama gazeto „Flamoj de Bulgario“, aperanta en rusa lingvo, rakontis al siaj legantoj pri la Bulgara E-Teatro kaj centjara evoluo de la bulgara E-movado.

La eldonkvanto de la 8 tag-ĵurnaloj kaj revuoj en 32 numeroj, skribintaj pri Esperanto, estas pli ol ses milionoj. Kaj tio nur dum ok monatoj de la kuranta jaro. Tio estas vera sukceso.

La Buroo de CE de BEA aprobis specialan jubilean programon por la centra gazetaro, kiu publikigos diversajn materialojn dediĉe al la 100-jara datreveno de la bulgara E-movado (1889—1989). Aperos entute 20 artikoloj en 13 periodaj eldonoj.

Slavĉo DAVIDOV

MEMORE AL elstara poeto Dimitâr Zlatarski-Miti

La 1-an de oktobro 1989 forpasis nia amata kamarado kaj longjara fidela veterana esperantisto Dimitâr Zlatarski-Miti.

Dimitâr Zlatarski naskiĝis en oktobro 1903 en Varna kaj ankoraŭ tute juna li estiĝis instruisto en vilaĝo Krasimir. La sekvantan jaron li estas instruisto en vilaĝo Sava kaj poste por ĉiam restas en Dâlgopol. Ĉie, kie li estas instruisto, li instruas ankaŭ Esperanton. Esperantisto Zlatarski estas ekde 1919, kiam aperas la unua numero de „Bulgara Esperantisto” kaj Esperanto-poeto laŭ destino. Li estis unu el la triopo Esperanto-poetoj — Dimitâr Zlatarski, Asen Grigorov kaj Ĥristo Gorov, kiuj en 1923 tuj post la kruela frakaso de la Septembra kontraŭfaŝisma ribelo en originalaj verkoj kaj versoj en Esperanto respegulis la heroaĵon de la ribelintaj bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj kaj tiamaniere donis sian belartan kontribuon por pliriĉigo de la Septembra literaturo.

Li estis lingvisto — scianta kaj uzanta multajn lingvojn, inter kiuj ankaŭ la sanskriton. Zlatarski estis historiisto, botanikisto, etnografo,



arkeologo, folkloristo, pentristo, desegnisto, restariganto — li estis la memoro de la regiono de rivero Kamĉia. Liaj eltrovaĵoj igis la sciencistojn enskribi en la enciklopediojn kaj en la informlibrojn la vortojn: „Kulturo Zlatarski”. Laŭ lia iniciato oni faris dekojn da esplorfosadoj, sondaĵojn de arkeologiaj objektoj. Lia antaŭvidemo helpis la malkovron de du unikaj kulturoj de la homa civilizacio — „Usoe—1” kaj „Usoe—2”. Miloĵ estas la prilaboritaj kaj restarigitaj elmontraĵoj, kiuj memoros la manojn de Zlatarski.

La bulgaraj sciencistoj perdis valoran, kulturan kunlaboranton kaj esploranton, kaj la bulgara esperantistaro — elstaran E-poeton kaj sindonan, abnegacian esperantiston.

Ni kliniĝas antaŭ lia hela memoro.

Doc. Georgi DIMOV

Dimitâr ZLATARSKI-MITI

SEZONOJ

*Ondis ondoj sur la maro,
flugis birdoj el la sud’.
Floris floroj en kamparo,
logis turdojn ama lud’.
Flugis birdoj el la sud’,
flutis turdo per la flut’.*

*Flutis fluto en arbaro,
kuŝis en la nest’ turdin’.
Floris floroj kaj sen ŝparo
al abeloj donis sin.
Kuŝis en la nest’ turdin’,
ĝuis li ĉe ŝia sin’.*

*Sangis sango sur la buŝo,
dolĉis kisoj sen kompar’,
fajris fajroj ĉe la tuŝo
de soifa korpo-par’.
Dolĉis kisoj sen kompar’,
tiklis silko de l’harar’.*

*Zumis zumo en kamparo,
flirtis en la flor’ abel’.
Lumis lumo sur la maro,
tagoj fluis en fabel’.
Flirtis en la flor’ abel’,
ŝovis sin al la miel’.*

*... Nubas nuboj sub la suno,
muĝas ondoj sur la mar’,
pluvas pluvoj en aŭtuno,
ĉesis fluto en arbar’.
Muĝas ondoj sur la mar’,
rulos sin la jar’ post jar’.*

1939

VINTRA NOKTO

*En la ĉambro mi ensole
sidas antaŭ la kameno.
Forflugintajn sen reveno
tagojn pensas mi nevole.*

*Sur fenestra vitro florojn
blankajn pentras la glacio.
Min alblovas la magio
de flatantaj rememoroj*

*La ventego furioze
jen fajfadas, jen ekĝemas.
Mi sur ŝian ŝultron premas
sonĝe kapon por ripozi.*

Sava, la 12-an de decembro
1922

NIA ENKETO

1. Kiu publikaĵo en numero .../1989 estas plej sukcesa?

.....
.....
.....
.....

2. Kiu publikaĵo en numero .../1989 estas plej malsukcesa?

.....
.....
.....
.....

3. Kion vi opinias pri la lingvaĵo de „Bulgara Esperantisto“?

.....
.....
.....
.....

4. Kion vi atendas legi en revuo „Bulgara Esperantisto“?


.....
.....
.....
.....

Nomo, adreso, profesio, aĝo

.....
.....
.....
.....

Inter la respondintoj de la enketo ni lotumos libron de bulgara E-aŭtoro, kunlaboranto de la revuo, sur kiu estos lia aŭtografo.

Por respondi la demandojn vi povas uzi apartan folion. La Redakcio atendas enketilojn-respondojn ĝis la 20-a de februaro 1990. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 5/1990.



Deziras korespondi

ALĜERIO

BAHI ABDELLAH (23-jara) — chez Lassouani Larbi, C¹ à Ammi Moussa 48315 — kun gejunuloj el ĉi pri muziko, sporto.

MEBAREK DJILALI (22-jara) — 62 Rue Frères Mahmoud, 48315 Ammi-Moussa, W Relizane — pri moderna muziko, vojaĝoj, kolektas pk.

ZIANE MIDOUD (22-jara) — 09 Rue Daïl Lahcen, Ammi-Moussa 48315, Relizane — kun ĉi pri ĉt.

BULGARIO

ATANASKA HRISTOVA (15-jara) — 5600 Trojan, ul. „Vasil Kolarov“ 4 — kun gejunuloj el ĉi pri moderna muziko, kino, kolektas pm.

E-societo „KONKORDO“ — 1090 Sofio, PK 45 — deziras starigi kontaktojn kun societoj, kiuj ankaŭ estas nomataj „Konkordo“.

DIANA NIKOLOVA — 5300 Gabrovo, ul. „Sofronij Vračanski“ 1, et. 3 — kun ĉi pri lingvaj problemoj.

KRASIMIR DENEV — 5300 Gabrovo, ul. „Ĉumerna“ 4 — kun ĉi per bk, kolektas anekdotojn kaj folklorajn gramofondiskojn.

SLAVKA MARKOVA (28-jara) — 1612 Sofio, kv. „Hipodroma“, ul. „Dobri Hristov“ 52, bl. 146, vñ. III, ap.52, sem. Vasilevi — kun ĉi pri muziko, literaturo, turismo.

ĈEĤOSLOVAKIO

PĚVA HOUDOVÁ (52-jara) — CS—26101 Příbram III, Ryneček 151 — kun bulgaraj esperantistoj, interŝanĝas kalendarojn.

DENISA DRINOCKÁ (13-jara) — CS—62400 Brno, ul. Urbánkova 22 — kun bulgaraj gejunuloj pri ĉt.

STANISLAV MAJER (pensiulo) — CS-78383 Troubelice 46, okreh Olomouc — kun ĉi pri ĉt.

POLLANDO

WANDA TARKOWSKA (30-jara instruistino) — PL—05—400 Otwock, ul. Poniatowskiego 3/71 — kun ĉi pri literaturo, turismo, kolektas bk.

RYSZARD SZYKIEWICZ (33-jara) — PL—58—260 Bielawa, os. XXV—Lecia PRL 9/32 — kun bulgaraj esperantistoj loĝantaj ĉe Nigra Maro kun ebleco de reciproka gastado.

HENRYK KLIMCZUK (33-jara veterinaro) — PL—22—620 Komarow, ul. Borowinka 36 — kun ĉi pri ĉt.

BARBARA WALKOWIAK (19-jara tajlorino) — PL—61—330 Wiołek, ul. Bankowa 12, Poznań 24 — kun ĉi pri ĉt.

EWA BRODA (20-jara) — PL—33—133 Wal-Ruda, Wal-Ruda 67 — kun ĉi pri turismo, literaturo, muziko kaj modo.

JAN TYBUSZEWSKI (65-jara) — PL—76—270 Ustka, ul. Klonowa 1 — kun ĉi pri kuracbioenergio kaj drogherboj.

RUMANIO

ȘTEFAN MIHAI (50-jara inĝeniero-fervojisto) — R—2200 Brașov, ul. Mircea cel Bătrân 39, bl. 51, ap. 26 — kun ĉi pri turismo, interŝanĝas E-aĵojn.

SOVETUNIO

EŬGENO JANGULOŬ (25-jara inĝeniero-gasisto) — SU—625009 Tjumenj, PK 139 — kun ĉi pri muziko, sporto.

ALBINA ABDRAHMANOVA (17-jara) — SU—453125 Sterlitamak, ul. Kommunističeskaja 35—28,

Baŝkiria Aŭtonoma Respubliko — kun ĉi pri lingvoj, reklamo, politiko.

ELENA NIKITINA (17-jara) — SU—453125 Sterlitamak, Avenuo de Oktobro 24—15, Baŝkiria Aŭtonoma Respubliko — kun ĉi pri lingvoj, kuirarto, kolektas bk.

VIKTOR MOŬROZOV (67-jara instruisto de ekonomiko) — SU—357538 Pjatigorsko, ul. Mira d. 37, kv. 40, Stavropolskij kraj — kun ĉi pri ĉt, precipe historio, literaturo.

VARMAJN BONDEZIROJN!

La jubileo devigas nin mencii pri ŝiaj 50 jaroj, sed ni ne rajtas emfazi ilin. En Razgrad preskaŭ ne troveblas esperantisto netuŝita de materiala kaj spirita sindonemo de Milena Georgieva. Ŝi dividas ĉies triston kaj pliiĝas la ĝojon. Ŝiaj kursanoj dumvive memoros la unuajn belsonajn frazojn en Esperanto.

Ni fiaskus provante danki per vortoj. Kara Milena, eksentu nian neesprimeblan dankon! Ni deziras al vi sanon kaj fortojn, por ke vi kuraĝigu nin kaj progresu nia movado. Multajn kaj feliĉajn jarojn en la E-movado.

Esperantistoj el Razgrad

БЪЛГАРИЯ ПОЩА

1889-1925

Христо Ясенов



1989 Т. ПАВЛИКОВ

8^{CT}

BULGARIA

FILATELO

Asocio „Komunikado“ en Bulgario emisiis la 25-an de septembro 1989 specialan poŝtmarkon dediĉitan al 100-jara jubileo de la naskiĝo de la granda bulgara poeto Hristo Jasenov.

La pentristo de la marko estas Todor Vardjiev.

Valoro — 8 stotinkoj.

Formato — 25 × 40 mm (vertikale).

Dentumo — 13.

Prestekniko — ofseto.

Papero — 100% celulozo.

Presejo — Ŝtata Presejo de la Komunikado.

Eldonkvanto — 800 000 pecoj.

Draguŝko PETROV

EFIKA RIMEDO

Konfidinte sian 5-jaran infanon al la oldaj gepatroj, la juna geedza paro elmigris al eksterlando por serĉi sian fortunon. Post 15 jaroj la adoleska filo ricevis leteron de sia patrino. Ŝi informas lin pri sia reveno, indikante daton kaj precizan horon de alveno aervoje.

Surmetinta sian plej novan veston, la adoleskulo alvenis la flughavenon kun granda bukado el freŝaj ekzotaj floroj. La aviadilo alteriĝis. Amaso da pasaĝeroj kun pezaj valizoj descendas laŭ la movebla eskalo. Vane la atendanta junulo streĉas okulojn por malkovri siajn gepatrojn. Jen! Al li proksimiĝas elegante vestita damo. Ŝi ĉirkaŭpremas sian filon kaj tenere kisas, kisas lin.

— Infano mia! Vi ne povas rekonii min. Mi ja estas via panjo!

— Panjo, en via lasta letero vi menciis, ke kun viaj tinkturitaj haroj vi aspektas tre juna... sed en tia grado...

— En eksterlando aĉeteblas ekstreme efika rejuniga rimedo — fluidaĵo, kiun oni verŝas en la bankuvon. Unuminuta restado en la kuvo rejunigas je unu jaro.

— Kian bebon vi tenas en viaj brakoj? Fraton, fratino?

— Nek frato, nek fratino. Ĝi estas via paĉjo. Kuŝante en la kuvo li endormiĝis. Post unu horo, reveninte domen, mi apenaŭ povis veki lin kaj... el la kuvo mi eltiris bebon.

Kiril DRAJEV

AMIKIĜIS TRI ESPERANTISTOJ

Dum la Balkana Esperanto-Konferenco en Ohrid, Jugoslavio, renkontiĝis kaj amikiĝis tri esperantistoj t. e. Ivan el Bulgario, Georgios el Greklando kaj Zoran el Jugoslavio. Krom sian gepatran lingvon kaj Esperanton ĉiu el ili parolas kaj unu fremdan lingvon t. e. anĝla, franca kaj itala. Iliaj profesioj estas instruisto, vendisto kaj teknikisto.

Divenu kiun fremdan lingvon parolas ĉiu esperantisto kaj kiun profesion li havas. Vi devas konsideri, ke:

- Zoran ne parolas anglan lingvon kaj ne estas teknikisto.

- La francparolanto ne estas vendisto.

- Ivan ne estas instruisto kaj ne parolas anglan lingvon.

- La teknikisto ne parolas francan lingvon.


- La vendisto ne parolas italan lingvon.

Cvetan MANOJLOV

ENIGMO

1. Sensebla manifestiĝo de bono.
2. Kemia elemento, atomnumero 92.
3. Rimedo, per kiu la homoj interkompreniĝas.
4. Surfaca tavolo de tero.
5. Sciigo.
6. Parto de la vorto.
7. Adverbo.
8. Kontinento.
9. Cerealo.
10. Nomo de eksprezidanto de UEA.
11. Sukcese eviti per forkuro.
12. Osta deformiĝo.
13. Monato.
14. Propra nomo de elstara bulgara esperantisto veterano.
15. Kuireja vazo.
16. Kaŭzanta respektan admiron.
17. Ĉiaspeca peco el ligno aŭ metalo.
18. Granda muŝosimila insekto.
19. Granda akva surfaco.
20. Ĝojkrii.
21. Lezo de haŭto aŭ mukozo kun substanco-perdo kaj malforta tendenco cikatriĝi.
22. Suda frukto.
23. Nepublika.
24. Bela akva floro.
25. Sento de tiu, kiu fidis la realiĝon de tio, kion deziras.
26. Arto aerveturadi.
27. Tago de la semajno.

Hristina TERZIEVA,
Velingrad



Ĉe ĝusta solvo de la enigmo el la unuaj literoj de la vortoj formiĝos frazo pri revuo „Bulgara Esperantisto”.

Noto de la Redakcio: Ni atendas viajn solvojn ĝis la 20-a de februaro 1990. La nomojn de la gajnintoj kaj la solvojn ni publikigos en n-ro 5/1990 de „BE”.

Al niaj legantoj kaj kunlaborantoj



*Peliĉan
Novan Jaron!*

